

ESPERANTO

NOVEMBRO 1960

53 a Jaro — N-ro 660 (11)



esperanto

REVUO INTERNACIA

NOVEMBRO 1960

53 a J A R O

N-RO 660 (11)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1960): 9,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle 16, Genève, Svislando (provizora adreso).

LA FRONTPAĜA BILDO :

La granda Budao en Kamakura, Japanujo, (Vidu p.p. 184, 185).

Foto Tibor Sekelj

Enhavo

La Internacia Arta Festivalo	181
Intensa kurso pri Esperanto	182
Universala Kongreso 1965	184
Tria Int. Konf. de Popoluniversitatoj . .	184
Japanujo vokas	185
Du notoj pri -ata -ita	189
Oficiala interurba ĝemeliĝo	190
Esperanto helpas al rifuĝintoj	193
Sukcesa 2-a Geografia Semajno	195
"Mia Patrujo"	196
La Sekreto kaj la Pruvo	197
Oficiala komuniko de la Estraro	199
La Koresponda Servo Mondskala	200

Rubrikoj :

La Internaciaj Konkursoj	188
Tra la Mondo	192
Esperantista vivo & Nekrologo	193
La Juna Vivo	194
46-a Universala Kongreso	195
Belarta Konkurso 1961	196
Radio	199
Oficiala Informilo	199

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

La Internacia Arta Festivalo

La Universalaj Kongresoj de Esperanto havas la celon fortikigi la solidarecon inter la personoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon, progresigi la Esperanto-Movadon kaj studi ĝiajn problemojn. Samtempe ili estas kulturaj manifestacioj, vere unikaj en la hodiaŭa mondo. Ĉiu U.K. tial necese havas du flankojn: la laboran kaj la kulturan.

La labora aspekto ne povas multe ŝanĝiĝi de kongreso al kongreso, ĉar Movado batalanta, kiel la nia, daŭre frontas diversajn problemojn, kiuj postulas solvon. Ju pli ampleksa estas la agado de la Asocio, des pli multnombraj estas la laboraj taskoj de la kongreso. Ĉefe tial la kongresoj de la lastaj jaroj havis la tendencon fariĝi iom unuformaj, kvankam tutcerte la diversaj kulturaj aranĝoj ne nur ne estis malatentataj, sed eĉ montris senduban progreson.

Nun, en Harrogate prezentigas aparte konvena okazo por doni konsiderinde pli grandan emfazon al la kultura flanko, sed tiel, ke la laboroj de la kongreso tamen ne suferu.

Harrogate estas ne granda urbo, sed ege bela kaj ĉarma. Kio pleje gravas, ĝi estas la kongresa urbo de Britujo, en kiu ĉiujare okazas granda nombro da naciaj kaj internaciaj kongresoj. Tie troviĝas je dispono speciale por tiu celo aro da taŭgaj salonoj, kaj eĉ la hoteloj estas adaptitaj ĝis maksimumo por la bezonoj de diversaj kongresoj. La urbestro mem havas apartan departementon, kiu okupiĝas ekskluzive pri aranĝado kaj organizado de kongresoj. En tiaj kondiĉoj la relativa malgrandeco de la urbo ne estas malavantaĝo, sed tute male avantaĝo por okazigo de kongreso kiel la nia kaj por organizo de elstaraj kulturaj manifestacioj.

Konsiderante ĉion ĉi, la Estraro de U.E.A. kaj la LKK decidis ligi al la 46-a U.K. la Unuan Internacian Artan Festivalon. Ĝi konsistos el jenaj branĉoj:

(1) *Belartaj Konkursoj*: Ili havos la saman karakteron, kiel en la pasintaj jaroj.

(2) *Oratora Konkurso*: Ankaŭ ĝi okazos laŭ la malnova Regularo. La Estraro donos plurajn temojn kaj ĉiu konkursanto povos elekti unu el ili laŭ sia bontrovo.

(3) *Teatraĵoj*: Estas antaŭvidita la partopreno de tri kategorioj de artaj trupoj: (a) la Internacia Arta Teatro, kiu estos subvenciita de la Kongreso; (b) aliaj teatraj trupoj, kiujn subvencios aŭ la landaj asocioj aŭ la ŝtataj instancoj; (c) malgrandaj teatraj grupoj de amatoroj, kiuj prezentos skeĉojn.

La trupoj sub (a) kaj (b) prezentos altnivelajn teatraĵojn de rekonita valoro. La grupoj sub (c)

povos prezenti skeĉojn aŭ mallongajn, unuaktajn teatraĵojn laŭ sia elekto, sed, por rajti partopreni en la Festivalo, ili devos havi la rekomendon de la landa asocio aŭ de alia kompetenta instanco (ekzemple grava funkciulo de loka profesia teatro).

(4) *Muziko*: Estos almenaŭ unu altnivela muzika vespero kun partopreno de rekonitaj artistoj. En la aliaj muzikaj aranĝoj povos partopreni elstaraj amatoroj (instrumentistoj, kantistoj, ensembloj de ĉambra muziko, eventuale ĥoroj), sed nur tiuj, kiuj posedas rekomendon de la landa asocio aŭ de alia kompetenta instanco.

(5) *Deklamado*: Povas partopreni nur personoj, kiujn rekomendas la respektiva landa asocio. La temoj estos: (a) aŭ originala poezio aŭ (b) tradukoj el poezio de la koncerna lando.

(6) *Filmoj*: Dum la tuta semajno estos prezentataj kulturaj, dokumentaj kaj aliaj filmoj, nur parolataj, kompreneble en Esperanto.

(7) *Plastikaj kaj figuraj artoj*: Tiu ĉi branĉo konsistos el ekspozicio de (a) pentraĵoj, (b) skulptaĵoj, (c) grafikaj artoj (skribo, desegno, gravuro), (d) artaj afiŝoj, eventuale aliaj subbranĉoj. Prof. Reto Rossetti promesis prizorgi kaj organizi tiun ĉi fakon.

(8) *Fotografiaĵoj*: La ekspozicio havos jenajn fakojn: (a) portretoj, (b) pejzaĝoj, (c) arkitekturo kaj artaj monumentoj, (d) bestoj, (e) laboro, (f) fotoj rilate Esperanton kaj la Esperanto-Movadon ĝenerale. Povos ekspozicii profesiaj fotistoj kaj amatoroj, sed speciala kompetenta komitato decidus ĉu iu foto estos allasita aŭ ne.

(9) *Lumbildoj*: Ĉiu partoprenanto povos prezenti difinitan nombron da lumbildoj laŭ sia elekto. La nombro estos fiksita depende de la nombro de partoprenantoj, tiel ke la prezentado ne daŭru pli ol du horojn.

(10) *Magnetofonaj Bendoj*: Ĉiu partoprenanto povos prezenti bendon de maksimume 10-minuta daŭro laŭ sia elekto (paroladetoj, intervjuoj, muzikaĵoj, diskutoj, scenoj el la naturo, tute mallongaj skeĉoj aŭ kiu ajn alia temo).

Tio ĉi estas nur la unua skizo de tiu impona Festivalo. Eble estos necese aŭ oportune aldoni plian branĉon, ekzemple folklorajn dancojn, aŭ el-lasi iun branĉon, se ne troviĝos alte kvalifikitaj partoprenantoj. Detaloj pri la unuopaj branĉoj kaj la kondiĉoj de partopreno estos publikigitaj en la oficialaj bultenoj kaj en la cirkuleroj de la LKK.

Estas necese diri jam nun, ke pro la ampleksa programo de la Festivalo, kelkaj aranĝoj devos okazi samtempe. Tamen, la plej gravajn artajn ma-

Intensa kurso pri Esperanto en Wedgwood Memorial College

Tiu ĉi kurso naskiĝis el ŝajne negrava konversacio ĉe kunveno de la North Staffordshire Esperanto Club en Hanley, Stoke-on-Trent, Anglujo. Iu menciis, ke la manko de kompetentaj instruistoj malhelpis la instruadon de Esperanto en la lokaj lernejoj. Marjorie Boulton, kiu estis tiuvespera vizitanto, diris: "Se iu povos aranĝi pri kurso por instruistoj, mi estos preta gvidi ĝin."

Rezulte, la eks-urbestro de Stoke-on-Trent, Horace Barks, kaj entuziasma, tre inteligenta juna instruisto, Jack Baggaley, kunlaboris por aranĝi kurson. Aranĝo tiel lastmomenta devis esti iom provizoreca: sed la du organizintoj sukcesis krei ion, kio multe eĥis en la regiono.

La kurso okazis en la Wedgwood Memorial College, en la beleta vilaĝo de Barlaston, proksima al Stoke-on-Trent, sed ekster la industria regiono, de la 28-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro, 1960. La Kolegio estas altprestiga kulturejo, kaj funkcias sub la kunaj aŭspicioj de la lokaj Klerigaj Komitatoj de Burton-upon-Trent, Staffordshire kaj Stoke-on-Trent, la Delegacio de la Universitato de Oxford pri Ekstermuraj Studoj, la Universitata Kolegio de Norda Staffordshire kaj la loka Laborista Kleriga Asocio. Tiu ĉi lasta organizo estas la rekta aranĝanto de la kursoj. La loka Komitato por Daŭra Klerigado subvenciis ĉiujn lokajn kursanojn per la duono de la kosto; la Intensa Kurso kostis 4 gineojn (176 steloj) kaj la prezo inkluzivis liton en litĉambro por unu, du, tri aŭ kvar personoj, tri bonajn manĝojn ĉiutage plus tri manĝetoj, kaj la tutan instru-programon.

(daŭrigo frontartikolo)

nifestaciojn tutcerte povos vidi ĉiu kongresano. La aliajn ĉiu elektos laŭ siaj gusto kaj inklino. Tutcerte ne troviĝos unu sola kongresano, kiu ne havos intereson por almenaŭ unu el la multnombraj branĉoj kaj fakoj.

La Unua Internacia Arta Festivalo estas unika avento en la Esperanto-Movado kaj ne estas kredeble, ke ĝi povos ripetiĝi en la baldaŭa estonteco. Ĉiu, kiu komprenas la eksterordinaran gravecon de tia kultura manifestacio por la plia altigo de la kultura valoro de Esperanto kaj por la prestiĝo de la Esperanto-Movado, certe ne preterlasos tiun vere unikan okazon. Ĝi samtempe sendube donos multe da ĝojo kaj plezuro al ĉiu unuopulo. Aliĝu do kiel eble plej baldaŭ al la 46-a U.K. en Harrogate.

I. L.

Aniĝis 17. gekursanoj: 15 geinstruistoj el lokaj lernejoj kaj du junuloj, kiuj nun estas en instruistaj seminarioj. Oni ne havis tempon bone antaŭanonci la kurson, kaj anoncis ĝin nur en la oficiala Lerneja Cirkulero kaj ĉe S.B.E.T. Pluraj personoj vizitis la kurson sporade; inter ili estis loka lernejestro kaj la ĉefo de grava loka biblioteko, kiu kaptis la okazon rigardi kaj aĉeti kelkajn librojn.

F-ino Boulton celis ne nur instruadon de la lingvo, sed klerigadon pri la signifo kaj valoro de Esperanto. Dum kelkaj horoj de intensa sed gaja laborado, la gekursanoj akiris la tutan bazan grammatikon de Esperanto, utilan malgrandan vortaron kaj kelkajn elementajn konceptojn pri stilo kaj vortfarado. Tiuj, kiuj havis je la komenco nenian scion pri la lingvo, kapablis je la fino aŭskulti فرمان paroladon *en Esperanto* kaj bone kompreni ĝin, kiel atestis ne nur diroj, sed vizaĝoj, aplaŭdoj kaj ridoj. Je la fino de la unua instrutago, ili jam kun plezuro kantis esperantajn kantojn kun tolerebla prononco kaj videbla sukceso-ĝojo. *Kantado* fakte ludis gravan rolon en la kurso: ĝi donis agrablajn ekzercojn pri prononcado, gajigis la gelnantojn, tuj montris la realan vivecon de Esperanto, kaj helpis krei etoson de solidareco.

La prelegoj de f-ino Boulton, anglalingvaj, temis pri: **Daŭra Studado Pri Esperanto; La Organizo de la E-Movado; La Biblioteko de B.E.A. (kun lumbildoj); Ekzamenoj pri Esperanto; Instrumetodoj por Esperanto; Aŭdaj-Vidaj Helpiloj en la Instruado de Esperanto; La Brusela Kongreso**



De maldekstre: F-ino Marjorie Boulton, S-ro W. Auld kaj S-ro Jack Baggaley.

(kun lumbildoj); **Kiel Esperanto Helpas en Aliaj Lernejoj Fakoj; Literaturo de Esperanto; Kelkaj Sidejoj kaj Personoj de la Movado** (kun lumbildoj). Ekspozicio de Esperantaĵoj restis en la prelega ĉambro dum la tuta kurso; kaj s-ro Bagga-ley tre laboris ĉe la bone provizita librobudo, kie li vendis dum la semajno librojn kaj Esperantaĵojn ĝis la valoro de £ 39 (1.560 steloj). Estas eble interese, ke kvankam la kursanoj de alia kurso komencis paroli kun la esperantistoj iom mokeme, scivolemo poste allogis ilin al la ekspozicio, kaj al la librobudo, kie ili iom vidis, ke Esperanto havas dignan literaturon, grandajn kongresojn, utilajn aktivojn; kaj la mokemo malaperis antaŭ la fino de la du kursoj.


F-ino Boulton ankaŭ prezentis filmojn: la anglalingvan propagandan filmon "In Other Words"; esperantlingvajn filmojn pri Oslo kaj Nov-Zelando; kaj kelkajn mallongajn polajn filmojn anglalingvajn sed rilatajn al taŭgaj temoj. Gramofondiskoj ludis utilan rolon: la kursanoj povis aŭskulti geknabojn de Egerton Park Secondary Modern School, kiuj ludis "la Fremduloj"; sekvante en la libro, ili jam kapablis ĝui la prezentadon. Ili tre ĝojis kiam ili trovis, ke ili jam kapablas kompreni la vortojn de jugoslaviaj, francaj kaj hispanaj parolantoj sur diskoj; kaj ili multe uzis la "linguaphone" diskojn de Edmond Privat. La diskoj vekis tiom da intereso, ke la gekursanoj mem uzis ilin por pluraj "neoficialaj" lecionoj.

S-ino E. M. Boulton, la patrino de la kursgvindantino, vizitis la kurson kaj faris interesan prelegon pri **Varsovio kaj Frostavallen** (kun lumbildoj kaj klarigaj objektoj). Kroata dialekt-poetino, Vlasta Ursić-Grdanović, nun en Stoke-on-Trent, vizitis la kurson kaj parolis al la gekursanoj Esperante. La ĉefa gasto estis tamen William Auld, nia

eminenta poeto kaj tradukisto, kies prelego anglalingva pri **Esperanto kiel Literatura Lingvo** estis elstara intelekta regalo kaj kiun la gekursanoj multe citis poste. S-ro Auld ankaŭ partoprenis en diversaj diskutoj, verve kantis kun la gekursanoj kaj amuzis ilin per bonega deklamado dum distra vesperprogramo. F-ino Boulton kaj s-ro Auld laŭtlegis poemojn al la gekursanoj, kiuj, kun la helpo de kelkaj klarigoj pri kelkaj vortoj, sukcesis kompreni poemojn de Julio Baghy kaj Baldur Ragnarsson kun la teksto sub la okuloj, kaj grandparte kompreni poemojn de Auld kaj Boulton mem, sen teksto, kaj "Ezopa Fablo" de Kalocsay. La vizito de S-ro Auld multe kontribuis al la sukceso de la kurso kaj flamigis entuziasmon en la gekursanoj. Bona bildo pri li inter la gekursanoj aperis en la loka gazeto.

La gekursanoj forportis amason da paperoj: anglajn "ŝlosilojn" kaj vortaretojn (kiujn ili uzis por parkerigi vortojn); multobligitajn poemojn; listojn de adresoj, libroj, lernolibroj. B.E.A. donacis senpagajn librokatalogojn al ĉiuj kursanoj, kaj ili ankaŭ ricevis la Unuan Bultenon de la 46-a U.K. S.B.E.T. donacis valoran raporton pri *Esperanto en Lernejoj* al ĉiu. Queensberry Road School, Longton, pruntis kantfoliojn. Norman Williams, lernejestro ĉe Egerton Park Secondary Modern School, helpis per valoraj informoj. La Ekspozicio kompreneble estis la rezulto de multa malegoisma kunlaborado.

La kurso ja pruvis, ke serioza traktado pri Esperanto nuntempe ricevas seriozan respondon. Nova E-klubo por instruistoj jam fondiĝis rezulte, en unu lernejo. Kelkaj vizitintoj ne plu havas siajn iamajn antaŭjuĝojn. Oni esperas, ke aliaj tiaj kursoj okazos. Se jes, ili estos multe pli bonaj, ĉar ni lernas per niaj eraroj.



La 47-a Japana Esperantista Kongreso
aŭg. 1960

Ce la standardo, de dekstre — S-ro Sindo, Prof. Yagi, Prof. Nishi, S-ro Ossaka, Prof. Kawasaki k.a.

Universala Kongreso 1965 al Japanujo

47-a Japana Esperantista Kongreso decidis inviton.

Prof. D-ro Hideo Yagi
Cefdel. de UEA

La 47a Japana Esperantista Kongreso havis lokon en Maebaŝi la 20—22an de aŭgusto 1960. La kongresurbo situas 110 km norde de Tokio, havas 176,400 enloĝantojn kaj estas centro de Gunma Gubernio. Rivero Toné, la plej granda en la Kanto-Distrikto, fluas preter la bela urbo kaj nutras vastan kamparon de morusaj arboj por silk-raŭpoj, ĉar la regiono estas famekonata pro silk-produktado. Pli ol 200 esperantistoj alveturis ĉi-tien el diversaj partoj de la lando. En la "antaŭ-vespero" la 20-an de aŭg. ĉe la Gunma Universitato oni elektis estraron por la Kongreso kiel jene: Prof. Dro S. Nishi, Honora Prezidanto, Prof. Dro S. Yamazoe, Prof. Dro S. Matsumoto kaj Prof. Dro S. Hori kiel Prezidantoj. Oni aprobis unue la protokolon de la antaŭa kongreso 1959 en Tokio kaj due aŭskultis raporton de la Prepara Komitato por Universala Kongreso en Japanujo, kiun mi faris, kaj post serioza diskutado, decidis inviti

la 50an UK en 1965 al Tokio. La decido estis aprobita la sekvantan tagon en la Kongresa Halo de la plejmulto de la ĉeestantoj.

La 21-an de aŭg. inaŭguro estis okazigita en la Komerca Ĉambro de Maebaŝi, kiun honorigis per ĉeesto la Guberniestro kaj la Urbestro. La 22-an de aŭg. fakkunvenoj okazis en Studenta Loĝio inter montaro Akagi apud la pitoreska lago Onuma. Prof. Nishi paroladis pri "Evoluo de Japania Anatomio en la 16-a jarcento".

Tokia Esperanto-Klubo baldaŭ organizos "Lokan Kongresan Komitaton" por 1965. La entrepreno estos sendube epokofaranta en la historio de Esperanto; UK en Azio! Mi deziras, ke multaj amikoj partprenu en ĝi, venante el ĉiuj anguloj de la mondo, por montri al Azio la universalecon de nia lingvo. Ŝparu monon de hodiaŭ por veturkosto al Tokio. Japanujo, lando de la leviĝanta suno, vin invitas!



Tria Internacia Konferenco de la Popoluniversitatoj

Tiu manifestacio okazis en Strasbourg de la 9-a ĝis la 11-a de Septembro 1960, sub la aŭspicioj de U.N.E.S.C.O. kaj patronado de altaj instancoj. S-ro Pierre PETIT, prezidanto de la Eŭropa Asocio de Popoluniversitatoj, estis unu el la organizantoj.

200 personoj el 14 landoj partoprenis en la laboroj kiuj estis dividitaj en 5 komisionoj, nome: Administrado — Instrumetodoj — Junulaj kaj Kulturdomoj — Muzikaj kaj Artistaj Aktivecoj — Gazetaro, Kino kaj Radio-Televido.

Kvankam la uzata lingvo estis la franca, 20 personoj el Francujo, Italujo, Germanujo, Svedujo kaj Svisujo scipovis Esperanton.

Estis rimarkinde vidi kvar negrojn kiuj estis observantoj por la franca Komunumo. Unu el ili, S-ro Bebey, radio-parolanto, entuziasmiĝis pri Esperanto kaj registris sur sonbendo konversacion inter diversnaciaj Esperanto-uzantoj.

La arta programo estis mirinda. Vendredon vespere okazis koncerto organizita de la franca Radio kun la Simfonia Orkestro de la Radio de Strasbourg. Sabaton vespere estis varietea programo kun teatraĵoj kaj muziko. — Fine, dimanĉon, en Obernai sur la placo de la urbdomo, ni vidis fol-

klorajn dancojn kun kantoj de studentaj artistoj el Jugoslavio, Tahiti kaj Hispanujo.

Malavare diversaj organizoj akceptis nin: La Komerca Foiro de Strasbourg — la Konsilantaro de Eŭropo, — la urboj de Strasbourg kaj Obernai. Plie, oni vizitis tre interesajn muzeojn, la katedralon kaj la urbon de Strasbourg sub la gvidado de specialistoj kaj lundon la havena administracio de Strasbourg invitis al veturo sur la rivero Rejno.


Dum la ferma laborkunsido ni aŭskultis la raportojn de la komisionoj kaj voĉdonis kelkajn deziresprimojn. Inter ili rezolucio pri la kunordigitaj kursoj de Esperanto, kun raporto al U.N.E.S.C.O., estis unuanime akceptita. La eŭropa Asocio fariĝas tutmonda. La ĉefa oficejo estos en Strasbourg kaj estos aliaj en Buenos Aires kaj en Novakchott por Afriko. Ĉiuj el ili uzos diversajn lingvojn, inter kiuj Esperanto.

Ni revenis hejmen tre kontentaj, ĉar ni povas esperi, ke Esperanto estos ĉiam pli uzata en la Popoluniversitatoj. Estus bone, se pli multaj esperantistoj interesiĝus pri tiu grava kultura movado.

J. Guillaume

EKȘPARU POR TOKIO ÇE U.E.A.

Petu informojn ĉe la Centra Oficejo.



Interno de japana hejmo en sia ĉarma simpleco.

JAPANUJO

VOKAS

Fine dum la lasta aŭgusto okazis la Tutlanda Esperanto-Kongreso en Japanujo, dum kiu oni decidis definitive inviti la Universalan Kongreson de Esperanto por la jaro 1965 al Tokio. Kaj ĉar la Estraro de UEA jam anticipe akceptis la ideon, tiu kongreso jam estas realeco, pri kiu oni devas pensi, kun kiu oni devas kalkuli.

"Japanujo vokas!" estos la devizo dum la sekvantaj kvin jaroj.

Ĝi estos sendube interesa kaj signifoplena okazaĵo por la esperantista mondo. La unuan fojon en ĝia trikvaron-jarcenta historio, la ĉefurbo de Esperantujo troviĝos sur la azia kontinento, kaj tuj en la ekstremo de malproksima oriento.

Por la japanaj esperantistoj la okazaĵo havos neeldireblan gravecon. La multaj miloj da japanoj, kiuj lernis la internacian lingvon ĉefe por legi kaj skribi, sed sen la espero iam povi uzi ĝin kiel utilan, parolan lingvon, nun subite ekkonsciiĝas, ke pere de Esperanto ili senpere povos amikiĝi kun esperantistoj el multaj landoj, povos gastigi ilin en siaj hejmoj, gvidi ilin tra la japanaj urboj kaj vilaĝoj, kaj elmontri al siaj skeptikaj amikoj kaj familianoj, ke la lernado de Esperanto neniel estis senutila ĥimero. Kaj ne nur al siaj familianoj. Ankaŭ al la landaj aŭtoritatoj ili povos pli palpeble elmontri la perfektan funkciadon de tiu internacia interkomprenilo, kiu alportis al Japanujo centojn da fremduloj el ĉiuj anguloj de la mondo. La pacamaj popolo kaj registaro de Japanujo sendube trovos novan motivon por primediti la eblecojn, kiujn nia lingvo proponas al iliaj celoj.

Ekde nun ĝis 1965 la rigardoj de centmiloj da esperantistoj direktiĝos al Tokio kun kreskanta intenseco, kaj kelkaj centoj el la plej feliĉaj ne nur en revoj sed per propraj piedoj surpaŝos la landon de la Naskiĝanta Suno.

Laŭ la provizora antaŭkalkulo, krom la 800 japanaj esperantistoj ĉeestos tiun kunvenon 200 eŭropanoj kaj 200 el Azio, Ameriko kaj Aŭstralio.

Sed se multaj personoj ekde nun komencas ŝpari por la longa vojaĝo, ankoraŭ grandaj surprizoj povas okazi.

La devizo "Japanujo vokas!" atingis min persone jam kelkajn monatojn pli frue ol ĝi fariĝis publika, kaj tiel okazis, ke mi respondis tiun vokon en marto ĉijara. Estante en Hindujo, anstataŭ reveni okcidenten, mi decidis flugi renkonte al la suno, rekte al Japanujo. Tie mi restis dum kvar monatoj.

Kio altiris min al tiu lando? Kion mi trovis tie!

Mi scivolis pri Japanujo kaj kiel esperantisto kaj kiel homo.

Iom ni havis okazon legi pri tiu lando kaj popolo, kaj ni vidis ankaŭ kelkajn filmojn. Tamen, tie ĉio estas malsama ol ĉe ni. Ĉio aspektas nekomprenebla kaj mistera. La malsameco de la lingvo kreas nepenetreblan baron inter la homoj, kaj malantaŭ la fermita buŝo ni povas legi nur nepenetreblan animon. Kion pensas tiuj homoj? Kion ili sentas? Iliaj moroj estas por ni strangaj. Eĉ iliaj domoj, vestoj, manĝaĵoj. Multaj demandoj sin altrudas al demandema menso.

Kio koncernas la movadon, por mi kiel komisiito de UEA por Azio kaj Afriko, Japanujo havis apartan gravecon. Dum miaj informaj prelegoj mi centojn da fojoj menciis Japanujon kiel unu el la landoj, kie Esperanto estas plej evoluinta. Miloj da eminentaj esperantistoj koncentriĝas tie. Tamen, mi sentis forte la izolitecon de la movado sur tiu insula lando. Ni devas klopodi ligi ĝin pli streĉe al la tutmonda movado, kaj interesigi ĝin pri la disvastigo de Esperanto en la aliaj aziaj landoj.

Sur la aerhaveno ridetantaj, afablaj geesperantistoj atendis min. Tokio, la naŭmiliono ĉefurbo impresis min per la denseco de la trafiko, pli ol iu ajn el la urbegoj, kiujn mi konas. Ĉirkaŭ la horoj de fermo aŭ malfermo de la magazenoj sur la ŝtuparoj kaj peronoj de la plurdekoj da fervojaj stacioj miloj da kapoj svarmas en konstanta movo supren kaj malsupren, kvazaŭ senfina rivero. Nur dank' al modela disciplino la urbo povas ekzisti.

Kompreneble, Japanujo jam ne estas la lando de samurajoj kaj de geĝoj. Kiu tion serĉas, verŝajne seniluziiĝos. Eĉ se la tradicio ekzistas kiel kultura fono, kiel folkloro postrestaĵo de pasintaj tempoj, Japanujo estas lando kiu rigardas antaŭen al la teknika moderna evoluo. Sed tio ne signifas, ke pitoreskaĵoj mankas en tiu lando. La mezepokaj kasteloj kaj ĉarmaj pagodoj, la unikaj parkoj kaj pontoj, la valoj kun ĉerizfloroj kaj la Fuĝimonto, ĉio tio ankoraŭ staras atendante la romantikeman turiston.

Post unusemajna restado en Japanujo mi parolis kun eminenta eksterlandano. Li diris al mi: "Se vi sukcesas esti invitita en japanan hejmon, vi povas konsideri vin feliĉa. Ili estas tre rezervemaj. Mi kaj miaj amikoj loĝas tie ĉi du-tri jarojn, kaj ni ankoraŭ ne estis en la interno de japana domo." Mi respondis: "Ĉu vere? Mi alvenis antaŭ unu semajno, kaj dum unu semajno mi loĝas en japana hejmo kiel gasto!"



La feŭdala kastelo de Osaka.

La vero estas, ke en tiu lando Esperanto akiras eksterordinaran gravecon por vizitanta fremdulo. Kvankam en Japanujo en la mezlernejoj oni lernas la anglan lingvon, malmultaj atingas fakte uzi ĝin parole. Ĝi ne sufiĉas por krei amikecajn rilatojn. Kontraŭe, Esperanto, ĉar pli facile lernebla, estas parolata de pli aŭ malpli granda grupo en ĉiuj urboj, kaj ĝi per sia ideologia fono estas la perfekta ilo por ke rapide malaperu ĉiuj sentoj de fremdeco. Dank' al tiu granda avantaĝo mi estis gastigata en dudeko da hejmoj, en kiuj oni traktis min kun la intimeco de familiano. Tiu ĉi fakto estas por mi neforgesebla donaco ricevita de Esperanto kaj de la japanaj esperantistoj.

Mi lernis plene aprezi la japanan hejmon. La ŝuojn oni demetas en cementita spaco ĉe la eniro, kaj anstataŭigas ilin per pantofloj. Ankaŭ ilin oni demetas antaŭ la eniro en la ĉambron, ĉar ĝi estas kovrita per puraj, molaj matoj, la "tatamioj".* La japana ĉambro estas je tri flankoj, aŭ almenaŭ je du, ĉirkaŭita de paperaj puŝpordoj. Kiam oni dispuŝas ilin, la ĉambro pligrandiĝas al la ĉirkaŭa koridoro, kies plenaj vitraj muroj liveras al la rigardo la serenajn pejzaĝojn de montoj, parkoj aŭ ĝardenoj.

La ĉefa ornamaĵo de la ĉambro estas la majstre elektita kaj kombinita aro de diversaj lignoj kaj bambuoj el kiuj estas faritaj la traboj, kolonoj, pordkadroj kaj plafono. Niĉo kiu okupas trionon de la sola muro, estas simpla familia sanktejo de bona gusto. En ĝi troviĝas vazo kun arte aranĝitaj floroj, kaj pendas kakemono, japana rulpenetraĵo. Sur la breto eble porcelana figuro aŭ "kokeŝio", japana ligna pupeto. La restanta parto de la muro estas kaŝita ŝranko en kiu oni gardas la matracon kaj litaĵon por prepari la liton vespere, sur la mato. Tial la sola meblo kutime estas malalta kvadrata lakumita tablo, ĉirkaŭ kiu oni sidas sur kusenoj. Ankoraŭ mi povas menciigi la grandajn kaligrafiitajn surskribojn super la enirejo, kaj la kartonajn interĉambrajn puŝpordojn, kun diskreta ornamo.

Tiuspeca domo aldonas al la vivo apartan ĉarmojon, kaj mi devas diri, ke mi volonte vivus en tia domo, almenaŭ dum 7-8 monatoj jare. Dum la vintraj monatoj la japana domo ne estas hejtebla, ĉar la lignan konstruaĵon minacus ekflamo. Oni sin varmigas plejparte super porcelana ujo kun varma karbo. Kompreneble, en multaj domoj la elektra hejtilo rapide penetras, elpuŝante la tradicion varmigilon.

La manĝaĵojn japanajn mi multe ĝuis. Kvankam en ĉiuj japanaj urboj ekzistas eŭropstilaj restoracioj, je la admiro de miaj japanaj amikoj mi sisteme rifuzadis esti kondukata tien. Por manĝi

* La "tatamio" pri kiu mi parolas, ne koincidas kun la difino de "tatamo" en la suplemento de PV. Ĝi ne enhavas matracon nek servas por dormado.

bifstekon kaj frititajn terpomojn mi ja ne bezonas fari tiel longan vojaĝon! "Suŝio" kaj "saŝimio" estis miaj favorataj manĝoj. La unua estas iuspecaj sandviĉetoj, kun bazo el rulaĵetoj el acida rizo, kun peceto de kruda fiŝo, polpo kaj de aliaj manĝaĵoj. La dua estas pecoj de kruda fiŝo, kiujn oni trempas en saŭcon kaj manĝas kun rizo. Mi ekŝatis ankaŭ la matenan "miso-supon" kaj diversspecajn marajn algojn. Komence mi ne ŝatis la tre ofte proponatan verdan, sensukeran teon, sed iom post iom alkiutimiĝis al ĝi, kaj fine eĉ ekŝatis.

Mi ofte aŭdis esprimon de admiro pro la bona manipulado de la "haŝioj" aŭ manĝbastonetoj. En multaj kazoj, mi rekonu, ili estas pli praktikaj ol la okcidenta manĝilaro. Kaj sendube pli higienaj. Ĉar en restoracio, kaj en privata hejmo la gasto ricevas tre simplajn bastonetojn el blanka ligno, ankoraŭ ne fintranĉitajn, tiel ke li mem devas disigi la du bastonetojn. Tio, kaj la fakto ke ili troviĝas en sigelita papersaketo estas pruvo, ke ankoraŭ neniu uzis la haŝiojn. Ankaŭ neniu uzos ilin poste, ĉar post la uzo ili estas forĵetataj. Do nekompareble pli higiena, ol la forkoj en eŭropa restoracio, per kiu miloj da homoj manĝis antaŭ vi.

Oni multon aŭdis paroli pri la ĉarmaj japaninoj. Tiujn onidirojn mi povas plene konfirmi. Ilia ĉarmo ne konsistas tiom en la korpa figuro, nek en la bela vizaĝo. Sed en ilia helpopreteco, vivo-kapablo, modestemo, inteligenteco kaj ridetemo. Kompreneble mi ne parolas pri geĵoj, kiujn mi tre malofte vidis, sed pri virinoj ĝenerale. La sinjorinoj plejparte ankoraŭ uzas siajn tradiciajn kimonojn, dum la junulinoj vestas sin laŭ lasta modo usona, kaj surmetas kimono nur por iu festo. La viroj kontraŭe en la urboj preskaŭ ĉiuj uzas okcidentan kostumon, kaj surmetas kimono nur kiam ili revenas al sia hejmo. Tiel ili sentas sin pli komforte. Same okazis al mi.



Tibor Sekelj en la hejmo de la familio Mijata en Tokio. Dank' al Esperanto en ilia kaj en multaj aliaj hejmoj li fariĝis familiano.



Fraŭlinoj Konoha montras al la vizitanto tradiciajn dancojn.

Unu el miaj gastigantoj (mi intence ne citas nomojn, ĉar estus senfina la listo de tiuj, al kiuj mi ŝuldas dankon, kaj timas ellasi iun) klopodis ĉe ĉiu matenmanĝo prezenti al mi novspecajn manĝaĵojn. Alia invitis min al sia hejmo, kie lia edzino regalis min per interesege te-ceremonio. Tria konatigis al mi la noktan vivon de Tokio. Kvara konatigis min kun fama antropologo, aliaj helpis en la tradukado de miaj artikoloj kaj libro, kaj kontaktigis min kun eldonejoj kaj televido. Aliaj montris al mi parkojn, muzeojn, templojn kaj teatrajn prezentadojn, dancis kaj muzikludis por mi, kaj regalis min per hejmeca atmosfero. Unu eĉ "regalis" min per aranĝo de la dentaro.

Mi multe vojaĝis ekster la ĉefurbo, kaj vizitis tridekon da urboj, de la ekstrema sudo ĝis la malproksima nordo, kaj ĉie trovis la saman amikecan helpemon. En Hokajdo, dum mia vizito al la ajna popolo, mi havis esperantistan interpretiston. Esperantisto aranĝis por mi loĝadon en budhana templo, kun aliaj amikoj mi observis la interesan fiŝkaptadon per kormoranoj, ĉeestis feston en Ocu kaj Ajabe, observis la religiajn centrojn de Kameoka kaj apud Nagoja, kaj plena de emocio descendis per boato la kaskadoplenan riveron Hozu. Esperantistoj montris al mi la vidindaĵojn de Nara kaj Kjoto, inkluzive antikvan dramon "Noh". Aliaj montris la rekonstruitajn Hiroŝima kaj Nagasaki, kaj la rememorojn al la atombomba katastrofo. Kaj belegajn montojn kaj valojn kun ĉerizfloroj, kaj la neforgeseblan Fugi-monton, kiun mi ne havis tempon surgrimpigi, malgraŭ la afabla invito de lerta montgrimpanto.

Nur mia afabla akompanantino lasis min sola ĉe la enirejo de la publika banejo de Noboribecu. Poste mi eksciis kial. La surskribo "viroj" kaj "virinoj" signas nur la senvestiĝejon, sed la pordoj de ambaŭ gvidas en la saman aron da bazenoj kun varma minerala akvo

Eĉ por mi, hardita vojaĝanto, la vizito al Japanujo estis spertoplana travivaĵo.

En trideko da urboj mi faris ĉirkaŭ 50 prelegojn, kelkajn nur por esperantistoj, sed la plimulton por ĝenerala publiko, kun interpretado al japana lingvo. Aŭskultis min ĉ. 15.000 personoj. Sed multe pli ol tio aŭskultis min tra la televida stacio NHK, en tre populara programo. Laŭ tiu programo en la tuta lando multegaj homoj rekonis min. En Japanujo ekzistas kvin milionoj da televid- aparatoj, do ĉiu kvara familio ĝin posedas.

Krom tio mi partoprenis la kongreson de la Kansai Ligo de Esperanto-grupoj kun speciala prelego pri organizado. En Tokio mi gvidis dutagan seminarion pri organizaj problemoj, kun la partopreno de 18 membroj, el Tokio kaj aliaj urboj.

La movado en Japanujo sendube disponas pri rekorda kvanto da esperantistoj inter universitataj profesoroj kaj aliaj intelektuloj. Multaj el ili verkadas en nia lingvo. En ĉiuj urboj kaj urbetoj ekzistas societoj, kaj ĉiu klera japano scias pri la ekzisto de Esperanto. Lernejoj libroj enhavas artikolojn pri ĝi kaj pri Zamenhof.

Tamen, surprizis min unuavide la fakto, ke relative malmultaj el la esperantistoj vere kapablas paroli la lingvon. La kialoj estas evidentaj. Antaŭ ĉio ni diru, ke Esperanto estas por japanoj malfacila lingvo, kvankam multe pli facila ol aliaj fremdlingvoj. Pro la izoliteco de la lando malmultaj alilandanoj alvenadas al Japanujo, kaj la plejmulto el la japanoj kredas, ke ne decas ke samlandanoj inter si parolu Esperanton, eĉ ne por praktiki. Al ĉio ĉi aldoniĝas la stranga kutimo anonci kaj gvidi kursojn unu- aŭ dumonatajn, kiuj apenaŭ sufiĉas por krei eternajn komencantojn.

Sed feliĉe, relative granda nombro da esperantistoj sukcesas superi ĉiujn ĉi malfacilaĵojn, kaj proprainiciate perfektigas en la lingvo.

Gvidan rolon en la movado havas la Japana Esperanto-Instituto, organizo kun longa kaj valora tradicio, kiu povas ankoraŭ multon fari por ke la movado en Japanujo akiru tiun popularecon kaj tiun forton, kiun ĝi povas dank' al multaj favoraj kondiĉoj, kiuj tie kuniĝas.

En la diskutoj pri la invito al la Universala Kongreso en 1965, la japanaj amikoj estis hezitemaj. Ili konsideris, ke la japana movado ankoraŭ ne estas sufiĉe forta.

Kaj mi respondis, kaj ripetas: Ĝuste pro tio vi bezonas kongreson. Kun la konkreta celo starigita nun, estas pli facile stimuli la perfektigon al la multaj miloj da komencantoj, kaj la lernadon al novaj miloj da estontaj esperantistoj. La organizan sistemon oni povas plifirmigi per bone pripensita "kvinjara plano". Nun ekzistas klara kaj difinita celo antaŭ vi, japanaj amikoj: elmontri vian esperantistecon kaj vian landon al la multnombraj vizitantoj, kaj per tio gajni por vi ankaŭ la aprezon de viaj landaj aŭtoritatoj. Per tio vi kontribuos al la venko de Esperanto mondscale.

Kaj jen estas ankaŭ bonega okazo por ni alilandaj esperantistoj por elmontri nian aprezon al la invito de la japanaj esperantistoj, kaj fari nian eblon por ŝpari sufiĉe da mono por ĉeesti tiun unikan okazaĵon en la malproksima oriento. Eble ni devos rezigni pri aliaj 2-3 kongresoj, eble ankaŭ pri aliaj elspezoj. Sed mi estas certa, ke neniu pentos kiu vizitos la landon de la Naskiĝanta Suno.



LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 30-a de septembro
Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2860	115.79
2.	Usono	3430	3580	104.37
3.	Belgujo	1985	2071	104.33
4.	Nederlando	5093	5311	104.28
5.	Britujo	6566	6647	101.23
6.	Francujo	7111	7198	101.22
7.	Svislando	2075	2075	100.00
8.	Finnlando	2515	2400	95.43
9.	Germanujo	7450	7040	94.50
10.	Svedujo	6605	6120	92.66
11.	Norvegujo	2035	1868	91.79
12.	Hispanujo	2837	2535	89.35
13.	Danlando	2921	2460	84.22
14.	Italujo	4469	3745	83.80
15.	Jugoslavio	7155	3395	47.45
16.	Brazilo	8260	3867	46.82

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	815	940	115.34
2.	Aŭstrujo	1425	1570	110.18
3.	Kanado	615	665	108.13
4.	Aŭstralio	1076	1121	104.18
5.	Sudafriko	250	255	102.00
6.	Israelo	250	240	96.00
7.	Portugalujo	575	535	93.04
8.	Urugvajo	255	230	90.20
9.	Novzelando	989	810	81.90
10.	Madagaskaro	250	202	80.80
11.	Islando	270	205	75.93
12.	Maroko	256	190	74.22



Ankoraŭ estas tempo atingi 100% antaŭ la fino de la jaro! Ĉefdelegitoj kaj perantoj, aktivigu la forgesemulojn!

DU NOTOJ PRI -ATA -ITA

I

La kvinlingva "Fundamenta gramatiko" (kaj la "Plena gramatiko de Esperanto" presita en la *Fundamenta Krestomatio*) nenion diras pri la uzado de la diversaj Esperantaj gramatikaj formoj. Pri ilia uzado oni devas sekvi la ekzemplojn donitajn en la "Ekzercaro".

En ĉi tiu normiga verketo oni trovas la jenajn ekzemplojn (la unua numero indikas la paragrafon, la dua la propozicion aŭ ekzemplon):

"Georgo Vaŝington estis naskita la 22-an de Februaro" (12,19)

"Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita" (25, 21)

"Mi estis amata" (25, 2)

"Vi estis lavita" (25, 8)

"Li . . . malbenis la tagon, en kiu li estis naskita" (33, 7)

"La fenestro longe estis nefermita . . . (33, 9)

"La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj (35, 18)

"Mia onklo . . . estis mortigita de neniu . . . (39, 11)

"El la tri leteroj, unu estis adresita . . . (42, 8)

Kaj en la "Antaŭparolo" mi trovas: "Se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita . . ." (p. VII)

La du ekzemploj de 25, 2 kaj 25, 8 havas nur valoron paradigman; sed meritas apartan atenton la ekzemplo de 25, 21, kie la du formoj "estis konstruata" kaj "estis konstruita" intence kontrastas (la frazo estas klare komprenebla eĉ sen la vortoj *jam longe*).

Por ĉiuj Esperantistoj, kiuj atente legis (kaj meditis) la Antaŭparolon de la Fundamento kaj profitis la profundan saĝon de ĝiaj prudentaj konsiloj, tio devus sufiĉi por forigi ĉiujn dubojn; kaj nenion valoras la saĝumado por senvalorigi la tre klarajn oficialajn ekzemplojn.

Cetere, la konstanta uzado de Zamenhof konformiĝas al tiuj ekzemploj; sed estas senutile prezenti aliajn citaĵojn, ĉar ĉiuj konsentas pri tiu ĉi fakto.

II

Estas plia fakto, malmulte konata: en 1932, s-ro de Beaufront — kiun d-ro P. Corret demandis pri tio — respondis, ke la reguloj pri la uzado de -ata/-ita, kiujn li enprenis en sian *Commentaire sur la grammaire Esperanto* (Kolekto Esperanta Aprobata de D-ro Zamenhof, No. 5), estis donitaj al li de d-ro Zamenhof mem. D-ro Corret demandis, ĉar li trovis, ke tiuj reguloj perfekte akordiĝas kun la Zamenhofa uzado.

La reguloj estas la jenaj:

"Prenez *ata* si l'acte est en train de s'accomplir
"relativement aŭ temps dont il s'agit.

"Prenez *ita* si l'acte a été accompli antérieure-
"ment au moment dont il s'agit.

"REMARQUE. Si l'on n'envisage que *le fait ac-*
"compli, *le résultat* de l'action, et non son dérou-
"lement, on emploie *ita*.

"En résumé, *ata* implique toujours une certaine
"durée du déroulement pour l'action regardée
"comme présente dans son mode ou son temps.

"Au contraire, *ita* implique toujours un acte
"transitoire, dans lequel on envisage uniquement
"le fait accompli, le résultat. Cette forme marque
"encore l'antériorité de l'action, si on compare son
"temps à celui d'une autre". (Commentaire sur la
"grammaire Espéranto, 3-a eldono, Paris, Hachet-
te, 1903, mm. 45-47).

("Uzu *ata*, se la ago estas en efektiviĝo, rilate al
"la tempo, pri kiu oni parolas.

"Uzu *ita*, se la ago efektiviĝis pli frue ol la mo-
"mento, pri kiu oni parolas.

"RIMARKO. Se oni konsideras nur la efektivi-
"ĝintan agon, la rezulton, kaj ne ĝian disvolvi-
"ĝon, oni uzas *ita*.

"Resume, *ata* ĉiam entenas ideon pri ioma daŭro
"de la efektiviĝo de la ago konsiderata kiel
"estanta en ĝia maniero aŭ tempo.

"Male, *ita* ĉiam entenas ideon pri nedaŭra ago, ĉe
"kiu oni atentis nur la faritan agon, la rezulton.

"Ĉi tiu formo indikas ankaŭ la antaŭecon de la
"ago, se oni komparas ĝian tempon kun tiu de
"alia ago".)

La reguloj de la Plena Gramatiko estas do la solaj korektaj laŭ la Fundamento kaj la Zamenhofa uzado. La aliaj proponitaj reguloj estus ŝanĝo, kaj "neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!" (Antaŭparolo, p.p. V-VI) Eĉ la Akademio de Esperanto ne havas tiun rajton.

Stefano La Colla, AK.

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanta teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Uzu ilin por la Tago de la Homaj Rajtoj la 10-a de decembro.

Eldonis UNESKO.

Mendu ĉe UEA!

Prezo: 4 int. resp. aŭ egalvaloro por la tuta serio.

OFICIALA INTERURBA ĜEMELIĜO INTER MASSA (ITALUJO) KAJ BAD KISSINGEN (GERMANUJO) KAJ LA ROLO DE ESPERANTO

Rilate al la artikolo de d-ro W. Hermann en la Revuo "ESPERANTO" n-ro 7-8 kiu pritraktis la klopodojn, konvinki la kompetentulojn por Eŭropa integriĝo pri la neceseco de l'apliko de la Internacia Lingvo en la internaciaj rilatoj eŭropaj, jen raporto pri era okazo sur tiu ĉi vojo — kvazaŭ el la praktiko:

Dum la postpaska semajno en M a s s a okazis la oficiala inaŭguro de la ĝemeliĝo inter la 2 urboj Massa (Apuania) kaj Bad Kissingen (Bavarujo).

Nun, iom distance, povas esti prezentataj la aspektoj kaj el la evolua historio kaj al la futuro de tiu okazo, en speciala mencio de la rolo ludita de Esperanto.

Antaŭ 3 jaroj la prezidanto de Eŭropa Federacio Bad Kissingen, D-ro K. Federer, tiam ne esperantisto, iniciatis dum persona restado en M a s s a ĝemeliĝon inter la 2 urboj. En sekvinta tempo dum postaj vizitoj D-ro Federer priparolis sian projekton kun la gvidantaj personoj de la tiea Eŭropa Movado kaj de la komunumo de M a s s a kaj daŭrigis la klopodojn al interkonsento en reciproka korespondado en lingvoj itala resp. germana.

En somero 1959 evidentiĝis ke pro lingvaj kaŭzoj la afero ne povas progresi sed stagnas: S-ro Prof. A. Grosso — Massa, sekretario de la Eŭropa Movado, en letero akcentis ke la ĉiufoja tradukado de germanlingvaj leteroj por la itallingva respondo kaŭzas malfacilaĵojn, tial konklude oni preferu de nun daŭrigon de l'korespondado ambaŭflanke en Esperanto. En tiu stato de la afero la Del. de UEA. kaj membro de la Eŭropa Fed. Movado en Bad Kissingen Hugo Röllinger estis informita kaj petita transpreni la pluan preparon de l'projekto. Post kelkaj koncizaj, detalaj leteroj, pritraktantaj i.a. la sintenon de la urbestro kaj de la urbestro en Massa, S-ro Röllinger raportis detale pri siaj rezultoj ĝisnunaj en estrara kunsido de la Eŭropa Movado en ĉeesto de la ĉefurbestro kaj de urbestroj de Bad Kissingen, fine proponante, ke li estus preta, post vizito al la Itala Kongreso de Esperanto en Firenze, sept. 1959, vojaĝi al M a s s a, por persone kontakti kun ĉiuj kompetentaj personecoj. Ĉi tiu propono estis akceptita, same kiel letere flanke de Massa.

S-ro Prof. Grosso en kunlaboro kun la Del. de UEA gefratoj D-roj Dazzini preparis ĉion necesan por la renkontiĝo. Bondeziroj kaj salutoj esprimataj al la delegito Röllinger flanke de ĉefurbestro D-ro Weiss por la aŭtoritatuloj en M a s s a kvazaŭ oficialigis la komision. 3 gravaj gazetoj de la regiono Massa-Firenze-La Spezia estis anoncintaj la baldaŭan alvenon de reprezentanto el Bad Kissingen al la urbestro de Massa por intertrakti pere de Esperanto pri projektita ĝemeliĝo. 4 tagojn personoj el Massa kaj Carrara informis senlace kaj afable la delegiton, S-ron Röllinger, pri ĉiuj sociaj kaj trafikaj cirkonstancoj de la teritorio apuana, pri la industriaj kaj ekonomiaj projektoj solvendaj, pri la ĝojoj kaj ankaŭ la zorgoj de ĝiaj enloĝantoj, akompanis lin en entreprenojn industriajn kaj faklernejojn, veturis kun li en la marmoro-minejojn de Carrara kaj en la kamparon. Nur tiamaniere, ne ĝenate de lingva diverseco, la delegito povis kolekti la impresojn senperajn, necesajn por plenumo de la tasko komisiita.

Intervjuo por 3 ĵurnalistoj en la prefektejo de Massa

vigle kaj flue okazis esperantlingve, per traduko de D-ro Dazzini.

La oficialan akcepton ĉe la urbestro D-ro Del Nero partoprenis 10 personoj, inter ili la jurista asesoro de la "Comune", reprezentantoj de industrio, de lernejoj, de turismo, de la Eŭropa Movado, de la Eŭropa Junularo kaj de UEA. Elegante kaj en perfekta maniero disvolviĝis la diskutado positive rilate la ĝemeliĝon akcelitan; senpaŭze frazon post frazo D-ro Dazzini tradukis, tiel ke regis tuj senĝena kaj amikeca atmosfero. Fine urbestro D-ro Del Nero decidis, ke estu formita Ĝemeliga Komitato, kaj kun reciproka tostado finiĝis la harmonia traktado.

Del. Röllinger, reveninte al Bad Kissingen raportis al sia ĉefurbestro kaj tiu persone lin petis daŭrigi la korespondadon en Esperanto por la preparo de ĉiuj nun necesaj detaloj por la oficialigo de la ĝemeliĝo.

En ambaŭ urboj samtempe, do aŭtune 1959, komenciĝis bone vizitataj Esperanto-kursoj, en Bad Kissingen akcelata kaj vizitata de la Prez. de Eŭropa Federacio Ges-roj D-ro Federer, en M a s s a ĝenerala kaj speciala kursoj por komitatanoj, kiun partoprenis ankaŭ la urbestro kun familio.

Ambaŭ urbestroj sinsekve sendepende decidis en solena maniero unuanime la pretecon al la ĝemeliĝo; ĉefurbestro D-ro Weiss ekz. je tiu okazo post voĉdono deklaris, ke nur estontaj generacioj povos prijuĝi la signifon de tiu decido kiel servon al la unuiĝo de Eŭropo.



Ĝemeliĝo inter Massa kaj Bad Kissingen. Starante urbestro de Massa D-ro Del Nero, proklamante la ĝemeliĝon, apude ĉefurbestro de Bad Kissingen, D-ro H. Weiss.

La solenajn ĝemeliĝajn manifestaciojn en **Massa-Carrara** de 16a—23a de apr. 1960 partoprenis flanke de **Bad Kissingen** oficiala delegacio de la urbestro, gvidita de la ĉefurbestro, kaj membroj de la Eŭropa Movado, inter ili geesperantistoj. Riĉenhava programo, destinita al reciproka interkoniĝado, estis preparita.

Paskan lundon Pastro Jacobitti el Romo celebris Sanktan Meson kun prediko en Esperanto, kiun ĉeestis multaj geesperantistoj, inter ili la tuta familio de l'urbestro de Massa. La oficialan Ĝemeliĝan Inaŭguran Ceremonion en la Prefektejo de Massa partoprenis ĉ. 1000 personoj. La filo de l'urbestro de Massa (12-jara) eldiris prologon en Esperanto. Alternis salutparoladoj en itala, germana kaj Esperanta lingvoj. La saluton de la Tutmonda Junulara Organizo alportis al la ĉeestantaro Vincenzo di Nubila, kies Esperanto-parolado estis rekte tradukita en la mikrofona de juna germana samideano, lerninta la internacian lingvon nur 5 monatojn en Popola Altlernejo de **Bad Kissingen**. Multaj skribaj kaj telegrafaj gratuloj estis alvenintaj, inter ili telegramo de la prezidanto de UEA., Prof. D-ro **Canuto**, kiu bedaŭris ege la neeblecon ĉeesti. En la festparolado urbestro D-ro Alberto Del Nero i.a. dankis "al la Esperanto-Movado pro la donita apogo kaj ni konfirmas la esperon, ke Esperanto povu fariĝi ilo por pli facila interkompreniĝo inter la popoloj de Eŭropa kaj de la mondo".

Artece gravuritaj medaloj kun enskribo en Esperanto digne estis prezentitaj en oro al la du urbestroj, en arĝento al la ambaŭurbaj komitatanoj kaj pluraj centoj en bronzo al la publiko. Arĝentan ekzempleron de l'medalo intertempe la urbestro de Massa en rekono de la interligaj meritoj de Esperanto dediĉis al la Prezidanto de UEA., prof. **CANUTO**.

Granda gazeto, "**LA NAZIONE**", petis artikolon speciale pri la lingva problemo rilate la akceladon de eŭropa unuiĝo; ĝi aperis, verkita de **H. Röllinger**, grandskale en la festnumero de l'20a de aprilo 1960 sub la titolo: **NECESSARIA UNA LINGUA COMUNE PER LA MAGGIOR COMPRESIONE FRA I POPOLI** ("Estas necesa lingvo komuna por pli bona interkompreniĝo inter la popoloj"). Krome la 3 ĉefgazetoj de tiu itala regiono raportis ĉiam denove de post la aŭtuna akcepto pri la okazantaj preparoj por la ĝemeliĝo, pri ĝia praktika kaj

ideeca senco kaj pri la evidenta neceseco de akcepto de la facile lernebla Internacia Lingvo.

Dum ĉiuj aranĝoj en tiuj festaj tagoj, dum la akceptoj, la ekskursoj perbusa kaj perŝipa, dum la dancfestoj kaj la festeno unu fakto evidentiĝis: elegante, ŝerce kaj facile interbabiladis italoj kun germanoj nur per Esperanto! La taŭgeco de nia lingvo forte impresis — des pli, ĉar estis konate ke tute ne ĉiuj ĝin parolantaj estas malnovaj Esperantistoj. Do ne estas mirige, ke tuj post reveno al **Bad Kissingen** estis postulata kaj aranĝita nova Esperanto-kurso en Popola Altlernejo por la revizito proklamita el **Massa** por fine de sept. 1960 al **Bad Kissingen**. En ambaŭ urboj pli ol 100 personoj ĝis nun aliĝis al kursoj por Esperanto kiuj funkcias parte eĉ nun en la somero.

Cetere, la unusolaj personaj invitoj kaj reinvitoj reciprokaj en la familiojn de Massa resp. de **Bad Kissingen** estis venintaj nur el la vicoj de la ambaŭurbaj ĝenerantoj de Esperanto. Jen interŝanĝo trans la limojn neorganizita, spontanea, naskiĝinta el la konvinko, ke la langoj povos esprimi kion sentas la koroj!

En la venontaj semajnoj en **Massa** oni donos al bela strato la nomon de Esperanto; por **Bad Kissingen** la ĉefurbestro la samon aprobis jam dum la preparoj de la ĝemeliĝo.

Resume estas konstateble ke kreskis videble kaj konsiderinde en ĝis nun malmulte interesitaj rondoj ambaŭteritoriaj la konvinko, ke sen komuna neŭtrala lingvo — apude de la tradiciaj lingvoj naciaj — persona, anima kaj vera alproksimiĝo inter diversnaciaĵoj en kadro de eŭropa integriĝo estus tre malfacila, ja verŝajne eĉ malebla.

Do jen valora kaj sukcespromesa tasko por eŭropaj esperantistoj, kapti en konvena maniero ĉiujn okazajn eltroveblajn en la medio de eŭropaj interurbaj alproksimiĝoj.

Lingve subteni estiĝontajn kaj jam ekzistantajn t.n. ĝemeliĝojn certe povas esti tute nova kaj ĝuste pro tio speciale efika maniero por evidentiĝi al homoj ĉiurangaj la unikan praktikan valoron de nia lingvo!

*Hugo Röllinger — Bad Kissingen
Catina Dazzini — Massa*



*Ĝemeliĝo de la urboj
Massa-Bad Kissingen.
Oficiala memoriga
medalo.*



Tra la Mondo

Danlando. La ministro por enlandaj aferoj, s-ro *Søren Olesen*, prelegis la 30.9.60 en la dana radio pri: Esperanto — la solvo de la interpopola lingvo-problemo.

★

Finnlando. Finna filmmagazeno en Helsinki por septembro, pere de delegito en Turku, aperigis artikolon kaj bildon de juna ĉina esperantisto, s-ro *Armand Su*. Li skribas i.a., ke por la unua fojo oni prezentis finnan filmon en Ĉinio. La nomo de la filmo estas: "Laŭ la leĝo" (finne: *Lain mukaan*).

★

Francujo. La 21-an de aŭgusto, oni inaŭguris en tute nova kvartalo de la industria urbeto Montreuil-Belfroy (apud Angers, M.-et-L.) avenuon "Esperanto". La foto montras s-ron *Henri David*, urbestron de Montreuil-Belfroy, kaj s-inon *Cheverry*, prez. de la Esp-Grupo de Angers.



★

Hispanujo. La 23-an de aŭgusto prelegis en Madrid bavara katoliko, pastro *Ludwig Thalmaier*. La prelego estis ilustrita per kolorbildo kaj temis pri "Vojaĝo tra Skandinavio". La intereso de la aŭskultantoj (pli ol cent) estis granda, kaj kelkaj el ili faris demandojn, kiujn afable respondis pastro Thalmaier. Vekiĝis intereso pri nia movado en katolikaj medioj.

De la 21-a ĝis la 24-a de julio okazis en la urbo Pontevedra la XXI-a Nacia Kongreso de Esperanto. La programo estis tre varia: Malfermo en la Mezlerneja Instituto, grava eksperimento inter knaboj kiuj lernis Esperanton de tri monatoj, informekspo-

zicio, folkloro festivalo, ekskurso kaj la sankta meso kun prediko en Esperanto, farita de pastro *Josep Casanovas*. Partoprenis pli ol 300 geesperantistoj.

★


Hungarujo. Fremdultrafika Oficejo de la K.J. Urba Konsilantaro Szeged, eldonis belaspektan faldfolion pri la vidindaĵoj en Szeged. Petu la broŝuron ĉe adreso Klauzál Placo 7, Szeged, Hungarujo.

★

Italujo. La direkcio de la Aŭtovojo Torino — Milano ĉiam publikigas prospektojn kaj regularojn por la fremduloj, kiuj uzas la aŭtovojojn. La prospektoj estas skribitaj en la lingvoj itala, franca, angla, germana kaj Esperanto. En Novara, apud la elirejo el la aŭtovojo, estas aŭto-hotelo konstruita de la granda firmo "Pavesi". Tie ĉi oni povas aĉeti manĝaĵojn, kaj granda afiŝo troviĝas sur la vando kun skribaĵo en multaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto "Servu vin sole". Tio pruvas, ke firmoj komencas kompreni la utilecon, kiun havas aŭ povas havi Esperanto en la rilatoj kun fremduloj.

★

Jugoslavio. Dum la internacia pedagogia renkontiĝo en *Bohinj*, Slovenio, de la 15-a ĝis la 25-a de julio 1960 ĉeestis ankaŭ geknaboj el 7 nacioj. La fotoj montras:



Eksterlandaj gastoj alparolas la infanojn. Parolas nun *Leo Lentaigne*,

Montpellier, gvidanto de la Esperantofako de la franca lerneja movado 'Freinet'. Dekstre s-ro *Svobodan Zlatnar*, Ljubljana, gvidanto de la junulara grupo.




Je la 6-a horo matene la geknaboj komencas sian labortagon per bonegaj gimnastikekzercoj. Poste ili kuros por lavi sin en la freŝa kaj pura akvo de la alpa lago Bohinj.



La infanoj verkas, desegnas, multobligas specialan eldonon de "Grajnoj en vento" dum la geinstruistoj kun intereso kaj aprobo sekvas ilian laboron. Malantaŭ estas rekonebla presilo lerneja de la franca movado "Freinet".

René Lentaigne, 14-jara knabo el Montpellier, faras linoleum-gravuraĵon por la gazeto "Grajnoj en vento", spe-




ciala eldono de la pedagogia seminario en Bobinj, Slovenio. Geinstruistoj *Fort* kaj *Lentaigne* legas novpresitan paĝon.



La prezidanto s-ro *Peter Zlatnar* per instigaj vortoj, invitas la geknabojn, kun krestanta entuziasmo labori por nia esperantista celo.

Jugoslavio. En la konstruado de aŭtoŝoseo en Jugoslavio partoprenas ankaŭ la II-a Esperanta Junulara Laborbrigado "Andja Ranković", kiu konsistas el 100 gejunuloj el 45 lokoj de Jugoslavio, apartenantaj al 6 nacioj. La brigado laboris sur sektoro Niš kaj havis sian stabon en Maloŝište.



La laborejo en Maloŝište apud Niš, kie laboras la II-a Esperanta Junulara Laborbrigado "Andja Ranković". Tiu ĉi J.E.J.A.-laborbrigado jam rikoltis grandajn sukcesojn. Tio kuraĝigas ilin proponi, ke TEJO provu starigi — ĉiujare en alia lando — internacian junularan Esperanto-laborbrigadon. La unua okazu venontjare en Jugoslavio kie ĝi laborus ĉe la konstruado de la aŭtoŝoseo "Frateco-Unueco".

★

Nov-Zelando. Je majo, nunjare, la 11-jara filo de s-ro *D. MacGill Stefano*, kiu estas instruata ĉe la Sedgely knaba lernejo de Mastertow, fondis novan klubeton inter siaj amikoj tie. La membroj estas senkoste instruataj de la fondinto. Stefano, kiu mem komencis lerni Esperanton en sia tria jaro, eble estas la plej juna fondinto de la tuta mondo. Jam la klubeto fenestre reklamas ĉe urba butikoj.

★

Pollando. La 19-an de julio 1960, antaŭ la urba teatro en Słupsk, dank' al la prezidanto de nia filio s-ro d-ro Ludoviko Zgirski, okazis malkovro de monumentŝtono honore al la kreinto de Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof.

Esperanto-societo en Ostrow Wlkp, sukcesis en junio estigi en sia urbo Zamenhof-straton. La sinteno de la Urba Nacia Konsilantaro al la koncerna propono de tieaj esperantistoj estis tre favora.



ESPERANTO HELPAS RIFUGINTOJN

Antaŭ unu jaro aperis en diversaj Esperanto-gazetoj alvoko kontribui por helpo al militviktimoj en Algerio. Tio havis efikon. I.a. pluraj esperantistoj-instruistoj aktivigis siajn lernantojn. Ili kolektis malnovajn materialojn, paperoj, ĉifonojn ktp. kaj tiamaniere ricevis monsumetojn por helpi la rifugintojn, inter kiuj estas precipe virinoj kaj infanoj. Multe helpis kaj helpas en tiu ĉi agado ankaŭ la Internacia Libervola Civila Servo. Interesitoj pri la agado bonvolu skribi al: Tj. R. P. Bijlsma, Sloterkade 187¹¹¹, Amsterdam-W., Nederlando.

ESPERANTISTA VIVO

Geedziĝis en Oulu, Finnlando, la 20.8.60 f-ino **Stanisława Nowak** el Łódź, Pollando, kaj Del. de UEA s-ro **Allan Mehtonen** el Oulu.

La 24.7.60 gefianĉiĝis en la urbo S. Paulo, Brazilo, f-ino **Ruth Fernández** (kasistino de S.P. Esp-Klubo) kaj manĉuria s-ro **Igor Colonna Valevski**, FD de UEA.

La FD de UEA en Akaŝi, Japanujo, s-ro **Kjosuke Jukimura** kaj lia edzino **Micuko** informas pri la naskiĝo de la unua filo, **Itaru**, la 8.7.60.

Al geedzoj **Hernández-Royo** el Sabadell la 16.8.60 naskiĝis fileto. Li ricevis la nomojn Lazaro Ludoviko.

S-ro **Otto Pilhofer**, FD por komerco de UEA en Nürnberg, Germanujo, festos la 18.11.60 la 50-jaran jubileon de esperantistiĝo. Li tre vigle kaj aktive partoprenas la movadon, kaj i.a. pro liaj klopodoj la urbo Nürnberg la 30.11.50 nomis novan straton: Esperantostrato.

NEKROLOGO

S-ro **W. P. Selis**, pioniro de la Groningena Esperanto-vivo, mortis la 4-an de septembro en la aĝo de 84 jaroj. Dum pluraj jaroj li estis estrarano de Groningena Esperanto-Klubo, Nederlando, kaj ĝis la fino li instruis la gramatikon.

S-ro **Jorge Frederico da Costa Teixeira**, tre fervora kaj aktiva membro en Lisboa, Portugalujo, tute neatendite mortis en aŭgusto 1960.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

3-a SOMERMEZA RENKONTIĜO DE S.E.J.U. NOVA SUKCESO

La 3-a somermeza renkontiĝo de SEJU ĉe la lago Simsjön en la proksimeco de la urbo Skövde estis por la esperantistaj gejunuloj, kaj speciale por la klubo-aranĝinto, Esperanto-Klubo de Skövde, granda sukceso, ĉar partoprenis tiun renkontiĝon ne nur geesperantistoj el Svedujo, sed ĉeestis ankaŭ 12 danoj kaj 5 germanoj. La tuta nombro de partoprenantoj estis 75.

La tempo de la renkontiĝo estis de la 24-a ĝis la 26-a de junio, la tagoj de la sveda somermeza festo aŭ Johano-festo, kiel kelkaj legantoj konas ĝin. Por la eksterlandaj gepartoprenantoj estis interese vidi la festadon en kiu la somermezaj stangoj prenas elstaran lokon. (Tiuj stangoj estas ornamitaj per folioj kaj florkronoj). Ĉe la publika festado de la somermezo fare de loĝantoj ĉirkaŭ la lago Simsjön, esperantistoj ne estis nur rigardantoj, sed ankaŭ aktivaj partoprenantoj de ŝerckonkursoj, en kiuj eĉ la germana grupo gajnis en unu branĉo.

La 25-an de junio estis la jarkunveno de SEJU, dum kiu oni elektis la novan estraron, kiu havas la jenan aspekton: Nils-Erik Kristoferson, prez.; ceteraj estraranoj Kerstin Olsson, Lillemor Streng, Åke Rohdin, Bertil Bondesson, Kjell Rehnström.

Danaj esperantistoj tiun tagon ankaŭ partoprenis la remkonkursojn, kiuj estis rigardataj de multaj homoj. Oni povas noti ke la aranĝintoj de la publikaj somermezaj festoj ĉirkaŭ Simsjön estis tre kontentaj ĉar en ili partoprenis eksterlandanoj-esperantistoj.

Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo transdonis tiun tagon ankaŭ sian honoran martelon al la plej aktiva junulara grupo dum la pasinta agadjaro. Tiu grupo estis la junulara grupo de Ystad (plej suda Svedujo), La Verda Ringo. Tiu premio migros inter la plej bonaj kluboj. Sur verda rubando, volvita ĉirkaŭ la martelo la nomoj de la plej bonaj kluboj estos enbroditaj.

La 26-an de junio la partoprenantoj de la renkontiĝo faris aŭtobuskurson ĉirkaŭ la monto Billingen. I. a. ili vizitis la surmontan restoracion Alphyddan (La Alpa Kabano, bone ko-

nata pro sia bongusta buterpantablo kaj la belega panoramo de la urbo Skövde kun la ĉirkaŭaĵo).

La posta tago, kiu ne estis oficiala tago de la renkontiĝo, estis dediĉita al ekskurso kaj vizito al la uzino por produktado de aŭtomotoroj, Penta. Tiun ekskurson partoprenis i.a. la 5 germanoj.

Fine oni povas diri, ke la loka gazeto "Novaĵoj de Skövde" faris tre longan kaj favoran raporton pri la renkontiĝo. La venonta Somermeza Renkontiĝo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo okazos supozeble en la urbo Alingsås en 1961.

ESPERANTA STUDRONDO POR PIONIROJ EN BUDAPEŝTA POLITEKNIKO

En la Politeknika lernejo "Ezermester" en Budapeŝto XI. (Baranyai útca 18. Fővárosi Fűiskola, Hungarujo) funkcias vigla Esperanto-Studrondo por pioniroj, kies membroj estas 12–20-jaraj lernantoj. La gejunuloj estas tre diligentaj, kaj ili jam komence de la somero preparis abundan laborplanon por la ĵus komenciĝinta lerneja jaro. Tiel ili planas eldoni lernejan gazeton, aranĝi en la lernejo publikajn kunvenojn kaj dancamuzojn, lernejan Esperanto-festivalon kaj ekspozicion. La murgazetoj, per kiuj la junaj esperantistoj ornamis ĉiujn lerneajn koridorojn, jam dum la pasinta jaro informadis la ceterajn 3000 geknabojn pri Esperanto. Por publika ekspozicio, kiun organizos la rondanoj, ili deziras interŝanĝi diversajn objektojn kun lernejoj en la mondo. Gejunuloj, kontaktu ilin! Helpu pruvi al lernejaj aŭtoritatoj, ke la junulara Esperanto-movado vigle vivas ankaŭ en alilandaj lernejoj.

TENDARO "MOSKITO"

La Beogradaj gejunuloj decidis ĉi-jare somerumi kune, kaj en la monato junio ili starigis tendojn sur tute neŝata riverinsulo proksime al Beograd. Tie deko la beogradaj gejunuloj pasigis 15 agrablajn tagojn.

En la tendaro ĉiutage estis multaj farendaj laboroj kiujn efektivigadis la tendaranoj mem. Oni devis alportadi nutraĵon, kolekti lignon, hejti,

prepari manĝaĵon, ordigi la tendojn, alportadi trinkakvon k.t.p. Tamen restis sufiĉe da tempo por amuzado, bano kaj naĝado. Preskaŭ ĉiutage la tendaron vizitadis beogradaj esperantistoj, kiuj deziris pasigi kelkajn horojn kun siaj amikoj. Vespere ĉiutage okazis granda tendara fajro, ĉirkaŭ kiu la tendaranoj pasigis la vesperojn kantante, muzikante kaj ŝercante.

Kvankam la vetero ne ĉiam estis bona, la restado sur la insulo restos en la memoro de ĉiuj tendaranoj, kaj verŝajne ili ne preterlasos la okazon venontjare denove okazigi ion similan.

EL LA LANDAJ SEKCIOJ

Britujo. Junularo Esperantista Brita eldonas multobligatan gazeton "Kial ne?" kun varia kaj interesa enhavo dulingva kaj plaĉa kovrilo. La redakcio celas iom internacian legantaron, ĉar ĝi volas, ke la membraro de JEB sentu sin nacia sekcio de internacia movado. Tial kunlaboro de eksterlandaj gejunuloj ĉu per abono ĉu per kontribuadoj estos bonvena. La abonprezo estas 6 ŝilingoj jare (aŭ egalvalore). Provekzempleron oni povas ricevi kontraŭ unu internacia respondkuponon. Bonvolu skribi al H. R. Tonkin, St. John's College, Cambridge, Anglujo.

Bulgarujo. En la kadro de la 34-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio, la 11-an de Julio ĉijara okazis junulara konferenco, kiun partoprenis pli ol 200 bulgaraj gejunuloj. La diskuto estis dediĉita al la rolo kaj rilatoj de la junulara grupo en la loka societo, ĝia agado en la junularaj kaj lernantaj medioj kaj la plivastigo de la internaciaj rilatoj de la junularo.

Estas menciinde, ke la kongresa rezolucio atentigas al la disvastigo de Esperanto inter la junularo precipe en lernejoj kaj la preparo de gvidantaj organizaj agantoj el la junulara medio.

Polujo. "Pola Esperantisto" en sia rubriko "La Juna Voĉo" raportas pri kelkaj novfonditaj junularaj rondoj. Fondiĝis junulara rondo en Wrocław, la rondo "Guto en Maro" en Nowy Sącz, Studenta Klubo en la Supera Pedagogia Lernejo de Kraków kaj Junulara Rondo en Warszawa. Aparte grava estas la agado de la junaj polaj esperantistoj en la societoj de amikoj de Afriko kaj en la nun fondata asocio de tiuj societoj.

N. Subotić

**T.E.J.O. ESTAS LA ESTONTO
DE U.E.A. ALIGU VIAJN
AMIKOJN AL T.E.J.O.!**

ESPERANTISTA SKIFERIO ADELBODEN SVISLANDO

24-an de decembro 1960 - 2-an de januaro 1961.

Adelboden estas skistacio en la Bernaj Alpoj alta je 1400 metroj.

Por la kvina fojo ni organizas skiferion, ĉar la pasintaj ĉiam majstre sukcesis. Ni donas al vi ĉi-sube la necesajn informojn.

Aĝo: de la 16-a, kaj ĝis kiam oni ne plu sentas sin sportema!

Loĝejo: Propra bela ĉaledo (alpa lignodomo) en la koro de fame konata skiparadizo nin atendas. Ĉiuj helpas en la interna doma laboro: kuirado, purigado.... Por la tranoktado estas pajlomatracoj kaj litoj.

Programo: skiekskursoj, glitŝuado, ekskursoj, festoj: kristnasko, novjaro, lernado de belaj ĥoroj, orgenkoncerto, prelegoj, prezento de kolorkliŝoj pri la pasintaj skiferioj....

Prezo: Por la tuta restado: svisaj frankoj 95.— (320 steloj). Ĉio estas enkalkulita: loĝado, hejtado, ĉiuj manĝoj, akcident-asekuro... Por parta partoprenado (almenaŭ 3 tagoj): potaĝo sv Fr 12.— (40 steloj).

Averto: Tiu skiferio estas organizata por esperantistoj. Ni rekompenkos per monrepago la bonajn esperantistojn, kiuj ne krokodilos. Se venas esperanto-komencantoj, ili devas antaŭ la skiferio almenaŭ esti trastudintaj esperanto-gramatikon. Ni ne plu akceptas tiujn profitulojn, kiuj klaĉas la tutan tagon nacilingve! Ni preferas esti malplimulte nombraj sed havi veran samideanan atmosferon.

Vojaĝo: De la fervoja stacidomo "Frutigen" vi veturos per aŭtobuso ĝis la haltejo "Schützenbrücke" (unu haltejo antaŭ Adelboden mem). Tie vi trovos indikilon kun la nomo ESPE-RANTO kiu montros al vi la vojon.

Adresoj: Por aliĝi skribu al ESPE-RANTO, La Sagne (NE), Svislando. Dum la skirestado la adreso estos: ESPE-RANTO, Chalet Egghaus Boden, Adelboden Svislando.

Aliĝo: Bonvolu aliĝi kiel eble plej rapide pere de poŝtkarte, kie vi mencias vian nomon, antaŭnomon, adreson, naskiĝdaton, profesion, alventagon kaj forirtagon en la skirestado kaj eventualajn rimarkojn. (**bonvolu skribi preslitere**). Ĝiru samtempe la antaŭpagon de svisaj frankoj 25.— (84 steloj) al nia poŝtĉekkonto ESPE-RANTO-JUNULARO DE SVISLANDO, La Sagne (Neuchâtel) IV 6291.

Aliĝo nur valoras post la ricevo de la antaŭpago.

Atentu: Muzikantoj estas petataj kunpreni sian muzikinstrumenton. Estas

eble lupreni skiojn, ŝuojn, glitŝuojn en Adelboden. Nia ĉaledo ne estas elasta, do tuj aliĝu kaj ne hezitu ĝis kiam ĉiuj lokoj estos okupitaj! La aliĝantoj ricevos pliajn informojn.

La Esperanto-edukistaro de Svislando
La Esperanto-junularo de Svislando

46-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Harrogate - 5-12 aŭgusto 1961 - Britujo
Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate
Telegrafadreso: Esperanto Harrogate.

Banko: Midland Bank Ltd., Harrogate.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 oktobro 1960
Kotizoj:

Ĝis la 31-a de decembro 1960 validas jenaj kotizoj: Kongresano 75/- anglaj ŝilingoj; Edzino 37/6 anglaj ŝilingoj; Gejunuloj ĝis 20 jaroj kaj Studentoj 25/- anglaj ŝilingoj.

Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 8 ŝilingoj; Edzino de Individua Membro rajtas rabaton de 4 ŝilingoj.

Ek de la 1-a de januaro 1961 la kotizoj plialtiĝos.

Pagoj:

La kotizo povas esti pagita ĉe ĉiu Oficiala Peranto de la Kongreso, ĉe UEA aŭ rekte ĉe la Kongresa Banko en Harrogate. Pagante la kotizon oni devas samtempe sendi plenigitan aliĝilon.

Aliĝiloj:

Ĉiu esperantisto povas ricevi aliĝilon ĉe sia landa Esperanto-organizaĵo, ĉe UEA aŭ rekte ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

Unua Bulteno:

La unua Oficiala Bulteno de la Kongreso, 8-paĝa kaj riĉe ilustrita, entenantanta plurajn detalojn kaj la provizoran programon de la Kongreso, estas ricevebla ĉe la landaj Esperanto-asocioj, ĉe UEA aŭ ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

17-a T.E.J.O.-Kongreso: Ĝi okazos en la universitata urbo Cambridge, unu semajnon antaŭ la Universala Kongreso.

Seminario "Oriento-okcidento". De la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961 (inkl.) okazos en Londono Seminario "Oriento-Okcidento", sub la aŭspicioj de UEA. La manifestacio enhavos prelegojn de eminentaj esperantistoj, prelegojn de britaj orientalistoj, filmojn, muzikon, poezion kaj dancojn pri Oriento.

Arta Festivalo:

La 46-a Universala Kongreso en Harrogate havos samtempe karaktere-

ron de Arta Festivalo. Estas planitaj, inter alie, teatraj, muzikaj, filmaj kaj plastikaj-figuraj branĉoj, en kiuj povos ludi kaj ekspozicii esperantistaj artistoj.

Teatraj prezentadoj:

Profesiaj, aŭ parte profesiaj, Teatraj Trupoj havos okazon ludi en Esperanto dum la Universala Kongreso. Ili devas esti plene subvenciitaj de sia landaj ŝtataj instancoj aŭ de esperantistaj Landaj Asocioj. L.K.K. akceptos sinproponojn ĝis la 15-a de decembro 1960.

G. C. Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

SUKCESA 2-a GEOGRAFIA SEMAJNO

En Rovinj, sur la nordjugoslavia marbordo, sur la Adrio, la 2-a Geografia Semajno okazis de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto, laŭ la antaŭvidita programo.

La tendodometoj de la geografoj troviĝis, inter multaj aliaj similaj, sur la pitoreska arbarkovrita insulo Katarina, en konstanta boatkomuniko kun la haveno de la urbeto Rovinj.

Ankaŭ ĉijare la vetero tre favoris la Semajnon, ĉar el la sep tagoj kvin estis sunoplenaj kaj donis eblecojn por perfekta somerumado. La kristalpura akvo de la blua Adrio montriĝis ideala tereno por submara esplorado, kaj la matena freŝeco de la pinarbaro plenigis la pulmojn de la amantoj de la joga sistemo, kiun pluraj membroj regule praktikadis.

Ĝindaj estis la ekskursoj al la antikvaĵoj de la urbo Rovinj, kaj al la belega Ruĝa Insulo. Sed precipe instrua por la partoprenantoj estis la klarigita vizito al la fabrikejo de fiŝkonservoj "Mirna", kie ili havis la okazon studi la funkciadon de la fabriko kaj ĝian ekonomian fonon.

Dum la semajno okazis 5 prelegoj. Du pri Finnlando, faritaj de la finna esperantisto J. V. Kostiainen, dum pri Nepalo, pri Japanujo kaj pri la ajnua popolo prelegis kun lumbildoj kaj magnetofona muziko Lic. Tibor Sekelj. Krom tio okazis studrondoj pri antropologiaj kaj geografiaj temoj, kaj muzika vespero "Promeno tra Azio".

Denove montriĝis ke la kunveno de geografoj kaj antropologoj — profesiaj kaj amatoraj — kaj de aliaj esperantistoj interesitaj pri esploradoj kaj vojaĝoj, povas transformiĝi en somerumadon utilan kaj agrablan samtempe, por relative malalta kosto. Pere de tiu ĉi Geografia Semajno la Internacia Geografia Asocio plenumis pluan gravan taskon.

La 3-a G. S. okazos tuj post la 46-a U. Kongreso, ie en Britujo tiel ke multaj kongresanoj povu ĝin partopreni. Detaloj sekvos.

T. Sekelj

BELARTA KONKURSO 1961

Ni invitas niajn verkistojn konkuri en la Belarta konkurso 1961. Por ĉi tiu konkurso, la dekdua en la serio, oni restarigas la **Kongreslandan branĉon**.

LITERATURA SEKCIO:

1. **Originala poezio** (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
2. **Tradukita poezio** (maks. 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj tamen la komisiono rezervas al si la rajton fari escepton en tiu postulo, se temas pri traduko el ia literaturo — ekz. la japana — kies poemoj estas esence mallongaj).
3. **Originala prozo** (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2 000—3 000 vortoj).
4. **Originala drameto** (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radiodialogo; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).
5. **Kongreslanda branĉo:** traduko de poemo (maks. 108 versoj) el la verkoj de la fratinoj Charlotte, Emily, kaj Anne Brontë.

La fratinoj Brontë edukiĝis en Jorkŝero, la angla gubernio, en kiu situas Harrogate, urbo de la 46-a Universala Kongreso (kvankam ili ne naskiĝis en tiu gubernio, kiel oni erare diris en la lasta numero de nia revuo). La etoso de tiu tereno forte muldis la verkojn precipe de Emily.

Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunsido dum la 46-a Universala Kongreso en Harrogate. En la sama kunsido oni laŭtlegos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj monpremion. Por ĉiu branĉo estos po tri premioj; tamen la komisiono rajtas reteni premion aŭ premiojn, se ĝiaopinie la cirkonstancoj tion postulas.

NOVA TALENTO: la komisiono ankaŭ aljuĝos diplomon kaj monpremion al tiu persono, kiu sendos la plej bonan verkon de verkisto premiita nek en ĉi tiu konkurso, nek en la dek unu antaŭaj.

ĜENERALAJ REGULOJ

1. Principe, ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 46-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA. Tamen, ĉe verkisto loĝanta en lando, kie plenumo de tiu kondiĉo estas ekstreme malfacila, oni laŭ bontrovo allasos konkursaĵon akompanatan de klarigo pri la cirkonstancoj.

2. La konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj): por britoj, 1 ŝilingo 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponon: 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas neebla, la partopreno estas senpaga.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe branĉo 2. (tradukita poezio) oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj

aperos laŭeble en la revuo "Esperanto" kaj sen la permeso de la redaktoro de tiu organo oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en ambaŭ tradukaj branĉoj ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita. Oni ankaŭ skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la nomon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj kun aŭ sia kongresnumero aŭ membromarko de UEA. Eventuale, oni aldonu klarigon laŭ la senco de la dua frazo de regulo 1.

5. Oni sendu ĉion: konkursaĵojn, slipojn, eventuale respondkuponojn, ktp. al la peranto: S-ro Albert V. King, 20 Lodore Road, Fishponds, Bristol, Anglujo.

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 11-a de junio, 1961.

Gerald C. Jervis, Sekretario.

"MIA PATRUJO"

INTERNACIA KONKURSO

DE INFANA DESEGNADO KAJ PENTRADO

Organizata de Pola Radio

sub la protektado de la Pola Komitato por la Aferoj de UNESKO

REGULARO

1. La temo de la konkurso estas "Mia patrujo". La partoprenantoj de la konkurso havas nelimigitan rajton elekti temon pri ilia lando (scenoj el la hejma, familia, antaŭlerneja, lerneja vivo, pejzaĝo urba kaj vilaĝa de la propra lando, ludoj, solenaĵoj, legendoj, pri la patrolando, historiaj eventoj ktp.)
2. La partoprenantoj de la konkurso havas nelimigitan rajton de elekto de la tekniko: koloraj krajonoj, paŝteloj, ĉina inko, tempero, akvarelo, oleaj farboj, krajono ktp.
3. La minimuma formato de desegnaĵo devas esti 25 x 35.
4. La konkurson povas partopreni infanoj el ĉiuj landoj de la mondo, estantaj ĝis 15-jaraj.
5. Desegnaĵoj ne subgluitaj, kartone pakitaj, devas esti senditaj ĝis la 1-a de decembro 1960 el la eŭropaj landoj, ĝis la 1-a de februaro 1961 el ekstereŭropaj landoj, al la adreso: POLA RADIO, VARSOVIO, POLLANDO — kun la kromnoto: "LA KONKURSO DE INFANAJ DESEGNAĴOJ". La desegnaĵoj devas havi dorsflanke legeble skribitajn: antaŭnomon, nomon, aĝon kaj precizan adreson de la infano aŭ de la lernejo, el kiu la desegnaĵoj estas senditaj, kaj ankaŭ eventuale nomon kaj antaŭnomon de la instruisto.
6. Por la plej bonaj desegnaĵoj estas aljuĝotaj premioj: oraj, arĝentaj kaj brunaj medaloj, diplomoj, alvenoj por 10-taga estado en Pollando, skotero, radioriceviloj kun transistoroj, porteblaj radioriceviloj, fotoaparatoj, kompletoj da pupoj, ludiloj, produktoj de la pola popola arto, gramofonaj diskoj, albumoj, specialaj premioj de diversaj institucioj kaj personoj.
7. Specialaj premioj estas aljuĝotaj al instruistoj pri desegnado el lernejoj kaj artistaj rondoj de eksterlerneja edukado, kiuj distingiĝos en la konkurso.
8. La plej bonaj desegnaĵoj estos montritaj en ekspozicio en Varsovio kaj eldonitaj en albumo.
9. La desegnaĵojn taksos juĝantaro konsistanta el reprezentantoj de Pola Radio, de la instruistaro, de la arta kaj kultura mondo.

LA SEKRETO KAJ LA PRUVO

Anna Blaman

Feria rakonto

Jam dum multaj tagoj mi kuŝis kaj sunumis min sur la balkono kaj neniam ankoraŭ mi trovis la vivon tiel facila kaj agrabla. Neniu zorgo turmentis min, neniu devo prenis min. La sola afero kiu okupis min, samtempe estis tre plaĉa al mi; la brila suno sur lazura ĉielo kaj profunde sube de mi la maro..... la Mediteraneo, kies supraĵo montras la kolorojn de duongemoj kaj kies ondoj rompiĝas sur la ŝtonplaĝo kun la sono de susuranta silko. Kelkfoje mi intence pensis pri la zorgoj kaj devoj, kiujn mi lasis malantaŭ mi, nur por ankoraŭ pli profunde konscii ke nun mi estas dum iom da tempo liberigita de tio. Kaj, eĉ ĝis la lasta momento, mi plenumis la taskojn ne facilanime, kaj tial mi nun ja havis plenan rajton je tiu ĉi libertempo. Ĉi tiun ĉielon sur la tero mi meritis! Kaj post tiu konkludo mi profunde kontenta forlasis ĉiun formon de pensado kaj okupiĝis nur pri senzorga nenionfarado en la suno.

Profunde sube mi aŭdis la batadon de la ondoj kontraŭ la rokojn kaj la ŝtonplaĝon. Kelkfoje mi aŭdis ankaŭ profunde sube de mi ridon aŭ ĝojkrion. Sur la ŝtonplaĝo kuŝis homoj, solaj aŭ kune aŭ en la intima gaja areto de tuta familio. Kaj jen kaj jen iu iris per singardaj piedoj al la akvo por naĝi kaj iom poste mi vidis la naĝanton ree leviĝi el la akvo, sunbrunigitan, brilantan en la suno, dum akvoperloj dancis ĉirkaŭ lin. Estis bela kaj ĉarma ĉi tiu spektaklo, kaj mi kuŝante rigardadis ĝin de sur mia alta balkono, kvazaŭ ĝi estus speciale prezentata por mi.

Ĉirkaŭ la sepa horo la ŝtonplaĝo fariĝis pli kaj pli malplena. Mi vidis la homojn prepariĝi al foriro, solaj aŭ duope aŭ en grupetoj de tuta familio, por reiri al siaj hoteloj. Kaj je la sepa kaj duono estis plu neniu tie, krom do tiun vesperon kiu kaŭzis tian renverson de mia memsufiĉa kvieto. Ĉar tiun difinitan vesperon mi rimarkis la knabinon kiu evidente estis kuŝanta tie jam la tutan posttagmezon, sed tute aparte, nerimarkite. Tiu knabino ne preparis sin al foriro, sed ŝi restis kuŝanta kie ŝi kuŝis, je la plej ekstrema fino de la plaĝeto, fakte jam sur la apuda roko. Ŝi kuŝis tie kun hela banmantelo sur si, tiel ke ŝi kovris sin per tio de la piedoj ĝis la talio. Ja intertempe venis vespera malvarmeto kaj krome ekblovigis vento. Kial ŝi restas tie, mi demandis min kaj mi klinis min super la rando de mia balkono kaj akre rigardis. Ŝi estis tre juna. Ŝia svelta knabina torso kies malgrandaj brustoj estis dece kovritaj, ne estis

sunbrunigita, sed male ankoraŭ rimarkinde blanka. Laŭ tio oni povus konkludi ke ŝi nur antaŭ nelonge alvenis en tiu ĉi regiono. Ŝian vizaĝon mi ne povis klare distingi, sed mi bone vidis ŝiajn harojn kiuj certe falis sur ŝiajn ŝultrojn kaj kelkfoje leviĝis en la vento. Ankoraŭ pli profunden mi klinis min de sur la balkono, maltrankvila. Ŝi ne movis sin. Ŝi kuŝis tie tiel senmove ke ŝi povus esti parto de la roka tero, blanka fibro en la roko kaj en formo de homo. Kaj ŝiaj haroj nedefinite malhelaj, eble verdecaj, aŭ eble brunecaj, povus esti nenio alia ol algoj moviĝantaj en la vento. Tiel mi rigardadis ĝis, mi opiniis, ŝi fine movis sin, nur momenteton. Ŝi levis, mi opiniis, momenton la kapon kaj rigardis la maron. Tuj poste ŝi kuŝis denove senmove, la brakoj falditaj sub la kapo kiel antaŭe, kaj la rigardo direktita al la ĉielo; soleca, kaj neniu povis rimarki ŝin tie, se ne hazarde, kiel mi. Kaj tiam mi forlasis la balkonon kaj la domon kaj mi komencis kuregi laŭ la serpentuma vojo malsupren. Kiu sciis kio doloras aŭ kaptis ŝin. Eble ŝi kuŝis tie kun granda ĉagreno, eble ŝi kuŝis tie malsana, ĉiukaze mi devis iri al ŝi. Mi konfesas, ne estis nura maltrankvileco, sed ankaŭ scivolemo kiu pelis min, kaj tiel mi malsupreniris en nekredeble mallonga tempo la serpentuman vojon kaj staris antaŭ la ŝtonplaĝo. Mi transiris ĝin kaj grimpis sur la rokon kiu kuŝis apude. Kaj kiam mi fine staris sur ĝi, mi apenaŭ rimarkis ke mi vundis miajn manojn kaj ke mi ŝvitis pro la streĉo. Ĉar tie ŝi kuŝis, blanka, ĝis la torso volvita en la banmantelo, kaj tiel senmove ke nur la larĝa rigardo malkaŝis ke ŝi ne dormas. Ŝiaj okuloj, pure lazuraj, rigardis supren al mi, senemocie, malvarme, kvazaŭ ŝi jam delonge sciis ke mi aperos, kio tute ne plaĉas al ŝi. Ŝiaj haroj kuŝis kiel moviĝanta krono ĉirkaŭ ŝia kapo kaj efektive similis al algoj, verdebrunaj algoj. Kaj subite mi sciis ke estus pli bone se mi ne estus veninta, ne nur tial, ĉar mi ne estas bonvena, sed ankaŭ tial ĉar ŝajnis ke iamaniere malbono venas de ŝi. Eble mi jam tiam demandis min ĉu mi ja havis normalan homan estaĵon antaŭ mi. Miaj zorgemo kaj helpemo ŝajnis al mi ridindaj, mi ne sciis kion diri kaj tiel restis preme silente tie sur la roko, silento kiu regis malgraŭ la brua muĝado de la rompiĝantaj ondoj. Tiu sono jam delonge ne plu similis al susuranta silko, sed male al samtempa rompiĝado de centoj da vitroj. Estis ŝi kiu fine rompis la silenton. Ŝiaj vortoj, mallaŭte ditaj, troviĝis kvazaŭ en alia sonomondo kaj plene supersonis la bruan neniigon de centoj da vitroj en

milojn da pecetoj. Ŝi diris: Vi jam komprenas, vi devus ne veni. Tial rapide reiru kaj forgesu ke vi iam vidis min. — Sed anstataŭ tuj reiri, mi unue provis ankoraŭ senkulpigi min. Mi pensis nur, ke io estas al vi kaj ke eble mi povos helpi vin. — Ion tian mi verŝajne diris. Post kio ŝi alrigardis min per siaj malvarmaj okuloj kaj same senpasie malvarme rimarkigis: Ne, vi estis scivolema, precipe scivolema. — Ĉu iris do ĝis tiu grado ke ŝi travidis min? Malfacile mi balbutis: Bonvolu pardoni, scivolemo finfine estas homa. — Kaj al tio ŝi diris same malvarme kaj same senpasie: Estas ĝuste tio. Kion komunan mi havas kun homoj kaj homeco? — En tiu momento verŝajne mia absurda supozo konkretiĝis.... kaj tio samtempe kvazaŭ katenis min sur la loko kie mi staris, mi simple ne plu povis foriri. Kaj denove ŝi sciis kio okupas min, ŝi diris: Ĝuste! Mi estas tia estaĵo, kiu rajtas ekzisti nur en la homa fantazio, sed cetere estas neata. Mi estas marvirino. — Mi supozis ĝin, ĝi estis elparolita, mi aŭdis ĝin kaj..... mi ne kredis ĝin. Malgraŭ ĉiuj strangaj signoj kiuj ĝin indikis, mi ne kredis ĝin, kaj ankaŭ tion ne necesis rakonti al ŝi. Vi ne kredas ĝin, ŝi diris per sia senpasia voĉo, vi preferas pensi ke mi estas ĥimero. — Momenton ŝi silentis kaj tiam daŭrigis: Tiel vi homoj fintraktas ĉion kio superas vian stultan intelekton. — Ŝia voĉo restis same malvarma kaj monotona kiam ŝi fine diris: Sed se vi ne kredas, do rigardu. — Kaj kompreneble, mi nenion pli multe deziris ol rigardi, mi devis rigardi, se mi volis certecon. Mi do jam faris paŝon antaŭen, mi jam preskaŭ klinis min al ŝi, dum mi diris: Vi certe opinias krude, ke via vorto ne sufiĉas al mi, sed ni homoj estas tiaj. Ni homoj ja ne kredas tiel facile kaj ni ĉiam volas la Pruvon. Nur la Pruvo validas. — Sed antaŭ ol mi vere klinis min al ŝi, ŝi interrompis min: Nur..... pripensu kion vi faras! — Ŝi tiris la dekstran brakon de sub la kapo kaj faris sorĉeman geston: Pripensu bone kion vi faras! Ĉar tiun Pruvon vi havos nur mem. — Mi hezitis kaj rigardis la sorĉeme svingantan manon kaj demandis: Kaj ĉu tio gravas? — Tiam mi aŭdis sin diri: Ĉu tio gravas? Kion vi tiam scios, tion scios nur vi sola kaj tion viaj kunvivantoj neniam kredos. Tio estas la fatalaĵo. — Mi do rigardis tiun sorĉeme svingantan manon. Fakte tiu en si mem jam estis sufiĉe da pruvo. Ja kiu homa estaĵo havas tian manon, tiel blanka kun tiel tremige pintaj fingroj! Tio ne estis mano, tio estis svinganta naĝilo! Kion vi diris, mi murmuris konfuzite, ĉu tio estas la fatalaĵo? Kial? — Ŝi remetis la brakon sub la kapon kaj diris: Ili primokos vin kaj deklaros vin freneza, se vi rakontos ĝin. Kaj se vi ne rakontos ĝin, ĝi staros por ĉiam inter vi kaj viaj kunvivantoj kaj

tio solecigos kaj malfeliĉigos vin. — Mi jam estis preta por krei ke ĉio ĉi ne gravos por mi, kiam ŝi subite decideme kaj kun iuspeca kompato rigardis min kaj diris: Aŭskultu bone! Dum vi parolas pri la Pruvo, mi parolas pri la Sekreto. Kaj tion kaŭzas tio, ke vi estas homo kaj mi estas marvirino. Sed kedu al mi, ĝuste la homo kiu serĉas la Pruvon, ne estas sufiĉe forta por la Sekreto. Li ne povas ĝin transdoni kaj li ne povas porti ĝin sola, kaj ĝuste tio faras lin malfeliĉa, nekuraceble malfeliĉa. Do estu prudenta: restu kiu vi estas, nescianto, kaj foriru antaŭ ol estos tro malfrue.....

Mi senespere rigardis ŝin, mi opiniis ankoraŭ ke mi luktas kun mi mem, ĝis mi rimarkis ke mi jam faris kelkajn paŝojn malantaŭen. Ŝajnas do ke mi jam rezignis pri la lukto. Mi rimarkis ankaŭ ke de tiu malgranda distanco, kiun mi metis inter ŝin kaj min, ŝi jam ree similis al ordinara knabino. Nure strange estis ankoraŭ, ke per larĝaj lazuraj okuloj ŝi rigardadis la lazuran ĉielon, kvazaŭ mi ne starus tie, kvazaŭ mi neniam staris tie.

Mia decido venis kiel impulso kiu pelis min. Mi turnis min, saltis de sur la roko, fuĝis trans la ŝtonplaĝon kaj komencis suprenkuregi la serpentinan vojon. Spiregante mi atingis la domon kaj spiregante, kun batanta koro, momenton poste mi staris denove sur la balkono. Mi ja sciis ke marvirinoj ne povas postkuri nin, enlanden. Mi do estis savita, mi restis la sama kiu mi ĉiam estis, homo inter la homoj, homo simila al ĉiuj aliaj homoj. Spiregante, ankoraŭ ne ree kvieta post mia forkuro, mi rigardis al la roko. Kompreneble ŝi ne plu kuŝis tie. Ŝi estis malaperinta en la maron. Ŝi neniam revenos. Nun mi vidis profunde sube de mi sole nur la malplenan ŝtonplaĝon, la rokojn, la vastan akvosupraĵon kaj la vastan spacon de la firmamento en kiu vento leviĝis kaj fulmrapide malleviĝis por rompi la ondojn en ŝaŭmon.

Mi forlasis la balkonon kaj fermis ĝiajn pordojn malantaŭ mi. Kaj en la duonluma ĉambro en mia propra limigita homa mondo, mi provis kompreni mian aventuron. Kaj ju pli longe mi pensis, des pli malgaja mi fariĝis. Kaj tio ne estis stranga, ĉar kio estis la rezulto de tiu ĉi travivaĵo por mi mem? Mi restis kiu mi estis, homo inter la homoj, sed dank'al la fakto ke mi estis same malkuraĝa kiel scivolema.... ke mi postkuris la Sekreton ne havante la kuraĝon ĝin kapti. Kaj mi pensis: Tio nepre ne estas io, pri kio indas fieri. — Kaj mi demandis min mem: Kiel antaŭ unu horo mi ankoraŭ povis pensi ke tiun ĉi ĉielon sur la tero mi meritas? — Kaj estiĝis mia intenco: Mi komencos fariĝi iom pli modesta... kvankam mi estis konscia ke ankaŭ tio certe ne estos facila.

Tradukis: MAVO

ALPROKSIMIĜAS LA MONATO DE LA DONACOJ:
LA MONATO DE LA ESPERANTO-LIBRO! DONACU LIBROJN!

OFICIALA KOMUNIKO DE LA ESTRARO

Sekve de la decido de la Komitato de U.E.A., farita en Bruselo la 3-an de aŭgusto 1960 per ĉiuj voĉoj kontraŭ unu la Estraro haltigis, konforme al la Art. 25 de la Ĝenerala Regularo la oficon de s-ro Hans Jakob kiel administranto de la Serva Centro en Ĝenevo.

La landaj kaj fakaj organizaĵoj, kiel ankaŭ la tuta membraro de U.E.A. bonvolu noti, ke ekde nun ĝis plia informo la adreso de la Serva Centro en Ĝenevo estas ĉe: Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle 16, Ĝenevo, Svislando. Ĉiujn leterojn, presaĵojn, informojn, petojn kaj sumojn por la Serva Centro de U.E.A. en Ĝenevo bonvolu estontece sendi nur al la supre menciita adreso por eviti, ke io ne atingu la celon.

U.E.A. povos rekonigi nur tiujn komunikojn kaj pagojn, kiuj estos faritaj al la menciita adreso de s-ro Bruno Keppeler por la Serva Centro en Ĝenevo.

La Estraro

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Radio Roma. 1-XI, Tra la literaturo; 4-XI, La itala komika aktoro Mario Riva; 8-XI, Novaĵoj el Italujo; 11-XI, Leterkesto kaj bibliografio; 15-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-XI, Itala provinco La Spezia; 22-XI, Roma baziliko Santa Cecilia in Trastevere; 25-XI, Latina dramisto Plautus; 29-XI, Italaj belartaj urboj Gaeta kaj Formia; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: Prof. D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Lugi Minnaja.

Radio Zagreb. 3-XI, Okaze de la internacia Tago de Monŝparo; 10 XI, Memore al la Oktobra Revolucio; 17-XI, Turista allogaĵo en Jugoslavio; 24-XI, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado.

Urugvaja Radio. La pasintan 2-an de Julio, S-ro Valdo E. Pons komencis regulan paroladon pri Esperanto ĉe la loka radio-stacio en Colonia (Emisoras Real de San Carlos, CX 159). La programo estas elsendata ĉiun Sabaton de 22.00 ĝis 22.05 per ondoj 188m. (1590 kcs).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO
N-ro 331

La 1-an de oktobro 1960

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de septembro 1959:

	1959	1960
Asociaj membroj	16118	13895
Individuaj membroj		
MJ	839	814
MA	5256	4991
MS	512	559
Pat.	7	5
DM	339	350
HM	45	43
JMJ	29	28
JMA	177	186
	7204	6976
	23322	20871

DELEGITOJ

Argentino

Córdoba D: D-ro José Cerato, advokato, 1a. Dorrego 1549 Bajo General Paz. FD (juro): la D.
San Isidro D: vakas.

Brazilo

Mataripe (Bahia) D: S-ro Floriano Pessoa, industria kemiisto, Refinaria Landulpho Alves.
FD (petrol-rafinado): la D.
São Paulo FD (spiritismo): S-ro Laccorday, Andrade, bankoficisto, Rua Boa Vista 242.

Britujo

Bishop Auckland (Co. Durham) VD: vakas.
Richmond (Surrey) D: vakas.
FD (jaĥtistaj aferoj): vakas.

Francujo

Mont-de-Marsan (Landes) D: vakas.

Germanujo

Leipzig JD: vakas.

Hindujo

Hoshiarpur D: vakas.
FD (budhismo-hinduismo): vakas.

Nederlando

Velp (Gelderland) D: vakas.

Pollando

Koszalin (Pomoze) D: Mag. Czesław Baranowski, instruisto, ul. Armii. Czerwoney 62/34.

Sovet-Unio

Petropavlovsk D: vakas.

Svislando

St. Gallen FD (fervojo): vakas.
FD (filatelo): vakas.

Usono

Kansas City (Missouri) D: vakas.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

543 Araujo, S-ro B. C. Rio de Janeiro, Brazilo.
544 Fóscolo, D-ro Hugo, Pompéu, Brazilo.
545 Freitas, S-ro A. Wantuil de, Rio de Janeiro, Brazilo.
547 Machado, S-ro Irene dos Santos, Rio de Janeiro, Brazilo.
548 Melo, S-ro Roskildes Pereira de, Rondônia, Brazilo.
549 Portugal, S-ro Fr. José Soares, Curitiba, Brazilo.
550 Verde, D-ro D.Lima, Ceará, Brazilo.
551 Jerković, S-ro Bogdan, Beograd, Jugoslavio.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 18.358,21 gld.
H. Menner, Aŭstrujo 4.35 gld.; N. N. en V, Nederlando 25. gld.
Entute 18.387,56 gld. je 1.10.1960.
Donacu unu milonon - aŭ pli!!! - de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo! Ankoraŭ ne ĉiuj enspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj

DONACO AL ĜENERALA KASO

N. N. en V., Nederlando 25.— gld.

DONACO AL A.P.O.

N. N. en V., Nederlando 25.— gld.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

KONDOLENCO AL GESINJOROJ HOLMES

La 7-an de oktobro 1960 forpasis en la alta aĝo de preskaŭ 91 jaroj sinjoro Jonathan Holmes, la patro de la Vicprezidanto de U.E.A. Al Gesinjoroj H. W. kaj Nora Holmes la Estraro, la Centra Oficejo kaj la Redakcio esprimas sian plej profundan kondolencon.

KONKURSO COMELLA-BASSOLS 1960

Kiel konate, en la kadro de la Belartaj Konkursoj okazas ankaŭ la "Konkurso Comella-Bassols" por la plej bona *gaja rakonto en Esperanto*. La konata kataluna esperantisto kaj pentristo J. Comella disponigas por tiu konkurso la sumon de 2000 hisp. pes.

Ni nun povas informi ke gajnis la premion 1960 S-ro Vladimir Váňa, Plzeň, Ĉeĥoslovakio, pro sia novelo "Kisteho". Koran gratulon!

LA KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Kiel ni skribis jam pli frue, la antaŭa prizorganto de tiu multuzata Servo, S-ro Daniel Luez, pro personaj cirkonstancoj, nome pro gravaj studoj kiuj okupas lian tutan tempon, jam de sufiĉe longe ne plu povis okupiĝi pri tiu laboro. Estis S-ro Luez kiu fondis proprainiciate tiun Servon, kiu baldaŭ kreskis kaj estis utila al multaj esperantistoj tra la tuta mondo. U.E.A. rekonis la valoron de tiu Servo kaj poste oficialigis ĝin. Ni ĉi tie deziras esprimi dankon al S-ro Luez pro lia plurjara kompetenta kaj senprofita laboro sur tiu kampo.

Kun ĝojo ni povas nun anonci ke ni trovis novan gvidanton por la Koresponda Servo Mondskala, kiun ni konas kiel tre kapabla kaj sindona persono. Ni ne dubas ke ŝi — ĉar ĉi-foje estas iu ŝi — same kompetente kaj kontentige plenumos la taskon.

Jen la nova nomo kaj adreso: F-ino C. Hueter, 12 rue de Jacobins, Clermont-Ferrand (P. de D), Francujo. Tel: 41.89. Krome, ni trovis duan personon kiu estas preta enkondukiĝi en la laborojn, tiel ke ĉio ne kuŝas nur sur unu persono kaj la laboroj ne tute stagnos se pro iuj cirkonstancoj la respondeca persono ne povos funkcii.

En la unuaj semajnoj de novembro F-ino Hueter komencos la laboron. Ni deziras al ŝi multan sukceson kaj esperas ke denove tiu ĉi Servo utilos al multaj.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj informado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

La Budha Lumo. Organo de la Budhana Ligo Esperantista; Jarabono: 4 ŝilingoj. Kasistino: M. E. Bowden, "Clarach", Abbey Drive, Gronant/Prestatyn, N. Wales, Britujo.

Skoltoj en 19 landoj abonas al "La Skolta Mondo" kaj Skolta Esperantista Ligo. Informpetu ĉe Charles Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs., Britujo.

Komerco per Esperanto kaj Esperanto per komerco. Interesas facile ekspluatable laj komercaj industriaj ideoj. Neta profito dividota honorsisteme: 40% ni, 40% vi, 20% Esperantcele. Skribu: Apartado 24661, Mexico 11, D.F.

Belan frontispicon havas nova eldonaĵo "William Penn 1614—1718"; majstra prelego de Prof. D-ro E. Privat. Eldonis Kvakera Esperantista Societo, Bath Road, Ventnor I.W., Anglujo. Prezo 3 resp. kup. aŭ 3 steloj.

Montru al ni vian landon sendante bildkarton por letervespero okazonta la 14-an de januaro 1961 por gelernantoj (60). Instituto de Esperanto, Sekretaria, Av. Gmo. Franco, 243, Barcelona 13 (Hispanujo). Dankrespondo certa!

Grava hispana gazeto pri konstruaĵoj, bezonas seriozajn gekorespondantojn por akiri fotojn de modernaj konstruaĵoj. Rekompencos aŭ ŝanĝos, laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Juan Farré, Avda. José Antonio, 432 Barcelona (15), Hispanujo.

Esperantista Domo. Ĉambroj por lui. Luprezo 50 pesetoj po tago kaj persono por dormi. 175 pesetoj same kun manĝoj. Oni ne allasas infanojn. Skribu antaŭe al S-ro Carlos Mestre, Serranos 20-3ª-1a, Valencia, Hispanujo.

Hispana filatelisto deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkseriojn kun Francujo kaj Okcidenta Germanujo, preferi novaĵojn. S-ro R. Ayala, Av. Gmo. Franco 243, Barcelona 13, Hispanujo.

20 jara junulo deziras korespondi kun junulinoj en Japanujo, Italujo, Aŭstrujo, Finnlando, Pollando (Varsovio) kaj Hungarujo (Budapest). Francisko Giménez, Calvo Sotelo 11, Alberique (Valencia), Hispanujo.

Korespondi kun eŭropanoj deziras (pri ĉiuj temoj) 28-jara universitata komizo Ichiro Kawano c/o Gaienso, 4—4 Sendagaya, Shibuya, Tokio, Japanujo. **Juna instruisto** kaj 18-jaraj kursaninoj deziras korespondi. Stefan Nowak, Torún, ul. Mickiewicza 1-3, Pollando.

Korespondi pri hundobredado, interŝanĝi fotojn, librojn pri hundoj ktp. deziras s-ino B. Kaczynska Kotwiczników 21—25, Gdańsk 1, Pollando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi gramofondiskojn kaj revuojn Georgi V. Kostov, str. "Vasil Zarkov" 19, Vraca kaj Peter A. Todorov, str. "Sredna gora" 88, Sofia 3, Bulgarujo. **Ĝuste vi estas tiu, kiun ni serĉas** se vi estas katolika fraŭlino inter 21 kaj 30 jaraĝa, se vi estas lerta hejm-prizorgantino, se vi absolute flue parolas kaj senerare skribas esperanton, se vi ŝatus restadi dum unu tuta jaro en franclingva esperantista hejmo (agrabla familia vivo), se vi interŝanĝe de kompleta senpaga gastigado (nutrado, loĝado) pretas vikle helpi en ĉiuj virinaj hejmaj taskoj, se vi havas jam bonajn nociojn de la franca lingvo kaj deziras plibonigi ilin per ĉiutaga praktiko, . . . tiam bonvolu **tuj** skribi kun kompleta vivrakonto kaj freŝdata foto al: Michel Pilloy (anonceto Esperanto), Espéranto-Office, Ottignies (Brabant), Belgujo.

Esperanto-Civito. Statistiko: Dovra Klubo 4; E-Civitanoj 3; Interesatoj 21 (Britujo 5; Italujo 3; Francujo kaj Svedujo po 2; Aŭstralio, Bulgarujo, Finnlando, Hispanujo, Japanujo, Jugoslavio, Kanado, Nederlando kaj Pollando po 1); Donacintoj 6 (Britujo 3; Aŭstralio, Francujo kaj Nederlando po 1); Vizitintoj 3 (Britujo, Francujo kaj Japanujo po 1); Reklamoj 53 (UEA 16; loka ĵurnalo por klubo 37); Fonduso £ 18.-.-. D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Tutmonde deziras korespondi letere aŭ bildkarte pri diversaj aferoj: S-ro Manoel Barbosa, Caixa Postal 181, Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj: Jorge Emiliani, Concordia 780, Cordoba, Argentino.

Argentina kuracistino deziras vojaĝi venontjare tra Francujo, Britujo, Germanujo kaj komunistaj(!) landoj, kaj prelegi pri naturkuracado (kun praktikaj demonstracioj); ankaŭ prelegi (kun diapozitivoj) pri sudamerikaj indiĝenoj. Mi postulas neniun pagon, krom loĝadon.

Medicinaj, esperantaj aŭ aliaj organizaĵoj kiuj interesiĝas pri tiuj temoj skribu al D-rino Rosa Scolnik, Humberto Iº 2160, Córdoba — Argentino.

Poŝtmarkinterŝanĝon kun ĉiuj landoj. Sendu kvanton el via lando kaj vi ricevos egalkvanton da skandinavaj markoj. Certa respondo. Sven Sundin, Stjärnvägen 9, VAXJÖ, Svedujo.

GRAVEGA TELEGRAMO

En la momento de presigo de tiuj ĉi paĝoj atingis nin la konsterna telegrama informo, ke la 29-an de oktobro 1960 subite forpasis en Torino

PROF. D-RO GIORGIO CANUTO, PREZIDANTO DE U.E.A.

Profunde kortuŝite ni esprimis nian kondolencon al Sinjorino Canuto kaj al ŝia filo. Same ni direktis kondolencon al la Itala Esperanto-Federacio, kiu perdis sian Prezidanton kaj gvidanton. Telefone ni petis, ke D-ro Inĝ. Giordano Azzi reprezentu la Asocion ĉe la funebra ceremonio kaj ke estu sendita florkrono en la nomo de U.E.A.

En la decembra numero de "Esperanto" aperos detala artikolo pri ĉi tiu terura bato kiu trafis la tutmondan Movadon.

Por la Estraro :

Harry W. Holmes O.B.E.,
Vic-Prezidanto

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Ĝenerala Sekretario

ĈU VI DEZIRAS
HELPI NIAJN
OFICEJAJN LABOROJN ?



Frue pagu vian kotizon 1961!

(konsultante la kotiztabelon en la oktobra numero)

ĈU VI DEZIRAS HELPI U.E.A. ?

FARIĜU DUMVIVA MEMBRO

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

POR LA DECEMBRAJ SOLENAĴOJ :

GRAVURBILDO DE ZAMENHOF,

21 × 27 cm de Reto Rossetti, (vidu
Dec. no. 1958) tre taŭga por klubejoj,
kunvenejoj ktp. 0,75 gld.; 3 steloj

FOTO DE ZAMENHOF,

poŝtkarto 0,20 gld.; 0,80 steloj.
Ĉion liveras la C.O. de U.E.A.

Ĉu interesas vin la folkloro de Nederlando ?

Aĉetu la ĉarmegan libreton

Sankta Nikolao en Nederlando

Bele ilustrita rakonto pri tiu granda festo de
la bonkora sanktulo.

Prezo : 1,50 gld., 6 steloj.

REPREZENTANTON

por vendo al industrio kaj administracioj en Svisujo
serĉas

Chemische Fabrik Crailsheim-Germanio.

ANGLA ANTOLOGIO

Auld kaj Rossetti, 320 p. 10.- gld. 40 steloj

BELARTO

Red. W. Auld, 72 p. 3,25 gld. 13 steloj. Por membroj
de UEA 2,75 gld. 11 steloj

Mendu ilin ĉe U.E.A.!

NUDISTOJ!

NATURISTOJ!

Por organizi grupon de vi inter la Esperantistoj
- - kaj grupon de Esperantistoj en la Internacia
Naturista Federacio, - bonvolu tuj anonci vin (nomo,
adreso, sekso, aĝo) al :

Leif Heilberg, 447 Cole St., San Francisco 17,
Calif., USONO.

(inform-petoj de interesatoj pri Nudismo/Naturismo
estos tuj respondataj)

(represo de tiu-ĉi anonco petata)

La Memorlibro

pri la

Zamenhof-jaro

**Monumento al la aŭtoro de la
Internacia Lingvo**

Riĉa fotomaterialo

**Elegante bindita en bonkvalita tolo kun
stampo en oro**

**Prezo : 12,50 gld.
50.— steloj**

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon !

**Eldonis C.E.D. Mendu ĉe U.E.A.
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam**

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio
reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje
aperos baldaŭ sub aŭspicioj de UEA

"Scienca laŭ enhavo ĝi estas beletra laŭ vestaĵo"
— diras pri ĝi E. Balech en la enkonduko.

En ĉi tiu interesega, streĉa kaj instrua romano pri marestaĵoj la aŭtoro senvualigas al ni la sekretojn de la maro — lulilo de la vivo sur nia planedo. Riĉaj plurkoloraj ilustraĵoj.

Naĝado kaj fotografado sub la marnivelo iĝas pli kaj pli populara. Ekkonu tiun mondon!

Jen titoloj de kelkaj ĉapitroj : Nevidebla martrezoro; Defendo per kemiaj armiloj; Interesaj koope-
rativoj; Bestoj kun inkujo; Lertaj aviadistoj; Fiŝoj aŭdigantaj voĉon; Venenaj fiŝoj; Fiŝo kun segilo ktp.

Provizora prezo : 5.— gld., 20 steloj.

El ĉiuj landoj kiuj povas pagi al Okcident-Eŭropo mendu pogrande kaj podetale ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

El popol-demokratiaj landoj mendu same ĉe S-ro Marinko Ĝivoje, Gornji Trg 31/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Retoriko

kun aparta konsidero al esperanta parolarto
de


IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

**Prezo : 11.— gld. bindita
44.— steloj
9.— gld. broŝurita
36.— steloj**

**Mendu ĉe U.E.A.
aŭ ĉe la aŭtoro**



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

**publikigis en sia numero de decembro
1959 grandan artikolon pri Zamenhof**

Tiu numero en **angla, franca, hispana aŭ
rusa** lingvo estas ricevebla ĉe la landaj
U.N.E.S.C.O.-instancoj **kaj ĉe U.E.A.**

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj

Prezo : inkl. sendkostojn : 0,50 gld; 2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan lingvon !

• • •

Krome, riceveblaj ĉe U.E.A.

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanto-teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO Prezo : 4 int. resp. kuponoj aŭ
egalvaloro por la tuta serio.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam.

